El Popola Ĉinio

人民中國報道

PEKINO 5 1960

ELDONAS: ĈINA ESPERANTO - LIGO

VERDA VOJO
ESPERANCKI KLUB TOWARZ
OCIETA ESPERANTO - K
GDAŃSK-DYREKCYJNA 2/

FLOROJ DE ANTAŬENSALTO DE BELARTAJ FILMOJ

(Daŭrigo sur la antaŭlasta paĝo. Legu ankaŭ la samtitolan artikolon.)



"Vivu la Antaŭensaltego", pentrita filmo pri alta produkto de ŝtalo, karbo, greno kaj kotono en la antaŭensaltego de 1958 kaj la senlima ĝojo de la ĉina popolo.

"La Rakonto pri Murpentraĵoj", pentrita filmo temanta pri murpentraĵoj de kamparanoj kaj pri iliaj venkoj super inundoj kaj ŝtormoj dum la antaŭensaltego.

Kara samidean(in)o,

En la tempo de daŭra antaŭensaltado de la socialisma konstruado en nia lando, "El Popola Ĉinio" tuj eniros sian kvaran jaron de la nova serio. Nia revuo havas taskon raporti al la legantoj pri la vivo, batalo kaj strebado de nia popolo, nunmomente precipe pri la socialisma konstruado de nia lando. Por plenumi la taskon ni ĉiam faras nian plejeblon kun la helpo de niaj legantoj. Oni facile trovas ke ni faris novajn klopodojn tiuflanke en la lastaj numeroj. Plimultiĝis artikoloj aktualaj kaj ankaŭ ofte la paĝonombro ekde nro 5/59.

Por la venonta jaro ni ankoraŭ pli streĉos niajn fortojn en tiu ĉi direkto, kaj tio espereble ricevos aprobon de multaj legantoj. Tamen por ke niaj laboroj estu vere fruktdonaj, tre necesas viaj kritikoj, sugestoj kaj konsiloj, kiuj estas ĉiam valoraj por nia laboro, kies sukceso multe helpos al la esperanta movado en nia lando. Bonvolu do detale sciigi al ni kiel vi opinias pri la enhavo, teknika aranĝo kaj lingvaĵo de EPĆ en la lastaj 6 numeroj. Kiajn mankojn aŭ malinteresaĵojn vi trovis en ili. Ĉiuj kritikoj pri kiaj ajn flankoj de niaj laboroj ricevos nian atenton kaj estos dankeme bonvenigataj.

Profitante la okazon ni petas vian afablan helpon:

1) *Bonvole jam nun renovigi vian abonon al EPĆ por 1961 ĉe nia peranto aŭ peranta librejo en via lando (listo de la perantoj estas ĉikune sendita.).*

2) *Varbi almenaŭ unu novan abonanton en 1961 por EPĆ. Por faciligi vian varbadon, ĉikune ni sendas al vi kiel specimenon unu ekz. de ĉijara malnova numero de EPĆ. Se pliajn specimenojn vi bezonos bonvole sciigu al ni.*

3) *Sendi al ni adresojn, al kiuj vi opinias inde sendi specimenon de EPĆ.*

Sinceran saluton kaj anticipan dankon pro via afabla helpema kunlaboro!

Redakcio de El Popola Ĉinio

20, IX, 1960, Pekino.

ABONILO DE "EL POPOLA ĈINIO"

Al (peranto)..... Dato:.....

Mi deziras aboni la gazeton "El Popola Ĉinio" de 1961. La kotizon mi sendas al vi ĉikune aparte pere de .....

Mia adreso (preslitere kaj latine)

Mia nomo (preslitere)

(subskribo)

Nuklean armilon kondamnas dekomence la ĉina popolo

— Parolado de Liaŭ Ĉenggi, vicprezidanto de la Ĉina Pac-komitato, en la kunveno de la pekina popolo por subteni la 6-an Mondan Konferencon kontraŭ A. kaj H. Bomboj kaj por Totala Malarmado —

Kamaradoj, amikoj:

Inaŭguros morgaŭ en Tokio de Japanio la 6-a Monda Konferenco kontraŭ A. kaj H. Bomboj kaj por Totala Malarmado. Ĝi estas kunvokita sub la situacio, kiam senprecedence alte leviĝas la movado de la aziaj kaj tutmondaj popoloj kontraŭ la imperiisma agresado kaj por defendo de la mondpaco, speciale sub la treege bona situacio karakterizata per la grava venko atingita de la brava japana popolo en sia patriota, justeca batalo kontraŭ la Japania-Usona Militalianca Traktato, kaj eksterordinare gravan signifon la konferenco havas en si. La ĉina popolo varme ovacias kaj tutforte subtenas ĝian okazigon, kaj ĉinaj amasaj organizajoj jam sendis al ĝi sian delegacion, estratan de Liu Ningji, prezidanto de la Tut-Ĉinia Federacio de Laboristaj Sindikatoj. Ni kore deziras sukceson al la Konferenco, kaj deziras ke ĝi faros novajn, pli grandajn kontribuojn al la batalo de la japana kaj tutmondaj popoloj kontraŭ la uzado de nukleaj armiloj, kontraŭ la imperiismaj militaj agresfortoj kun Usono ĉe la kapo kaj por defendi la mondpacon.

Oni memoras ke antaŭ 15 jaroj Usono ĵetis atombombojn en Hirošima kaj Nagasaki de Japanio, kaŭzante al la japana popolo senprecedencan katastrofon. La malutilojn de H-bomba provado ankaŭ plej multe kaj plej grave suferis la japana popolo. De 15 jaroj post la milito la japana popolo staras ĉiam en la unuaj vicoj en la batalo kontraŭ la nuklea armilo, persiste kaj senlace batalas kontraŭ la usonaj militbazoj, kontraŭ revivigo de japana militismo kaj armado de Japanio per nukleaj armiloj, kontraŭ la uzurpa okupado de Okinaŭa fare de Usono, kontraŭ la nova militintrigo de la usonaj kaj japanaj reakciuloj kaj batalas heroe por sendependeco, demokratio, paco kaj neŭtraleco de Japanio. Precipe en la lastaj du jaroj, la japana popolo levis la ĉiam pli altiĝantan tutnacian batalon kontraŭ la Japania-Usona militalianca Traktato kaj kontraŭ la usona imperiismo kaj ĝiaj agentoj. En la ardaj flamoj de luktado la japana popolo unuiĝis en ĉiam pli vasta kaj ĉiam pli fortika patriota unuecfronto. La konscio de la japana popolo ĉiam pli altiĝas, la unueco daŭre fortiĝas kaj la forto rapide grandiĝas en la luktado. La japana popolo levis sinsekve 22 tutlandajn unuecajn agadojn, donante pezajn batojn al la usonaj kaj japanaj reakciuloj. Sub la potencaj batalo kaj premo de la japana popolo, la ĉefo de la usonaj imperiistoj Eisenhower ne povis ne nuligi sian planon viziti Japanion, kaj la fidela agento de la usona imperiismo en Japanio Kiši ankaŭ devis eksiĝi. La venko de la japana popolo serioze malordigis la

EL POPOLA ĈINIO

Dumonata Gazeto
Eldonata de Ĉina Esperanto-Ligo
Adreso: P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

Enhavo de N-ro 5 (62) 1960

Bildo sur la kovrilo — **Abunda Rikolto de Kotono** *(Pentris Hju Hian)*

Nuklean armilon kondamnas dekomence la ĉina popolo

Salutparolo al la Tria Tutlanda Kongreso de Literaturaj kaj Artaj Laborantoj de Lu Dingji

Vojo de socialismaj literaturo kaj arto

La movado por teknika renovigo en Ĉinio

Mirinda replantilo

Senlime bona la urba popola komunumo

Nova vivo, nova energio

Sur la ĝusta vojo

Printempo en Lhasa

La nomo de la nepeto

Floroj de antaŭensalto de belartaj filmoj

Triumfo de kolektivismo

Bildo sur la dorsa kovrilo — **Translokigo de monto kaj plenigo de valo** *(Pentris Li Ŝuoking)*

agresan planon kaj militan manovron de la usona imperiismo en la Malproksima Oriento, forte kuraĝigis la batalon de aziaj, afrikaj, latinamerikaj kaj tutmondaj popoloj kontraŭ imperiismo kaj koloniismo, kaj faris grandan kontribuon al la pacdefenda afero en Azio kaj la mondo.

La lukto de la japana popolo estas grava parto de la lukto de la tutmondaj popoloj kontraŭ la usona imperiismo por defendo de la mondpaco. Ĝi trovas ĝeneralan simpation kaj subtenon de la popoloj de la socialisma tendaro kun Sovetio ĉe la kapo kaj ĉiuj pacamaj popoloj de la tuta mondo. La tutmondaj popoloj senescepte ĝojas kaj kuraĝiĝas pro la atingoj de la japana popolo en sia batalo. En la kunveno de la Konstanta Komitato de la Monda Pac-Konsilantaro, okazigita antaŭ nelonge en Stokholmo kaj partoprenata de delegitoj el pli ol 50 landoj, oni unuanime alprenis decidon subtenantan la lukton de la japana popolo kontraŭ la uzo de nukleaj armiloj kaj kontraŭ la Japania-Usona Militalianca Traktato kaj montrantan, ke "la lukto de la japana popolo ne nur estas senprecedenca en la historio de Japanio, sed ankaŭ ege kuraĝigas la pacan aferon kaj kontraŭagresan lukton de la mondo". La venko de la japana popolo ankoraŭfoje pruvas ke, se la vastaj popolamasoj nur unuigas sin konkorde kaj luktas obstine, ĉiuj intrigoj de la imperiismo kaj ĝiaj lakeoj estas venkeblaj kaj frakaseblaj.

La ĉina popolo decideme apogas, de komence, la deziron de la japana popolo sekvi la vojon de sendependeco, demokratio, paco kaj neŭtraleco, kaj decideme apogas la patriotan justan batalon de la japana popolo kontraŭ la uzo de nukleaj armiloj, kontraŭ la usonaj militbazoj, kontraŭ la uzurpa okupado de Okinaŭa fare de Usono, kontraŭ la Japania-Usona Militalianca Traktato. Antaŭ ne longe, kiam la japana popolo levis la grandiozan ŝtormon de kontraŭusona patriota lukto, la ĉina popolo okazigis kunvenojn kaj manifestaciojn tra la tuta lando, partoprenatajn de 20 milionoj da personoj, kaj disvolvis vastan amasan kampanjon por subteni la japanan popolon. La lukto kaj atingita sukceso de la japana popolo donis al la ĉina popolo tre grandan kuraĝigon kaj subtenon. En la lukto kontraŭ la komuna malamiko, la usona imperiismo, la popoloj de la du landoj reciproke subtenas, interkuraĝigas kaj antaŭenmarŝas mano en mano, kaj la amikeco inter la du popoloj ricevis pluan disvolvon. La amikeco de la du popoloj formita kaj disvolvita en komuna lukto estas detruebla de nenia forto. Ni gratulu la plifirmigon kaj pluan disvolvon de la amikeco inter la ĉina kaj japana popoloj, kaj antaŭgratulu la rapidan realigon de la longa paca kunekzisto inter la socialisma Ĉinio kaj la sendependa, demokratia, paca kaj neŭtrala Japanio.

En la tagordo de ĉifoja Mond-konferenco kontraŭ A. kaj H. Bomboj kaj por Totala Malarmado estas diskutotaj problemoj, kiaj: malpermeso de nukleaj armiloj; realigo de totala radikala malarmado; likvido de ĉiuj fremdlandaj militbazoj kaj agresivaj militaj traktatoj. Ni opinias ke ĝusta solvo de tiuj problemoj havas gravan signifon por defendo de la mondpaco. La ĉina popolo dekomence kondamnas la uzon de nukleaj armiloj, insistas pri paca utiligo de atomenergio por feliĉigi la homaron, kaj sincere, persiste klopodis por tio. Ni plene subtenas la ripete faritan proponon de nia registaro por kontrakti pacan pakton de neagresado inter aziaj kaj pacifikaj landoj, inkluzive Usonon, kaj fari la regionon libera de nukleaj armiloj. La propono kaj opinio de nia registaro estas konformaj al la komuna intereso kaj deziro de la popoloj de Azio kaj la pacifika regiono. Ni volas kune klopodi kun la popoloj de la koncernataj landoj por la realigo de la propono. Sed la usona imperiismo ĉiam obstrukcas interkonsentiĝon pri la problemo de malpermeso de nukleaj armiloj. Ĝi starigas kaj plivastigas ĉie militbazojn por nukleaj armiloj, intencante tiri Japanion, Sudan Koreion kaj pliajn landojn en sian sistemon de nuklea milito. Ĝi, krome, okupas ankoraŭ nian teritorion Tajvan, farante senĉese militajn provokojn kontraŭ nia lando. La ĉina popolo decideme kontraŭbatalas kaj severe kondamnas tian aventureman politikon de nuklea agresmilito de la usona imperiismo.

Malarmado estas komuna deziro kaj postulo de la tutmondaj popoloj kaj grava paŝo por protekti mondpacon. Niaj registaro kaj popolo ĉiam insistas pri totala malarmado kaj faris grandajn klopodojn por instigi al malarmado. Niaj registaro kaj popolo ĉiam subtenas la iniciatojn kaj agadojn de la sovetia registaro, koncerne al malarmado kaj malpermeso de nukleaj armiloj. Sed la usona imperiismo obstine rifuzadis la ripetfoje prezentitajn proponojn pri totala kaj radikala malarmado. Post sia disrompo de la konferenco de registaraj ĉefoj de la kvar potencoj, la usona imperiismo plie subfosis la Dek-landan Malarmadan Konferencon kaj freneze sinokupadas pri ekspansio de armado kaj militpreparado. La reprezentantaj personoj de la usonaj regantaj rondoj senĉese faras senkaŝajn provokajn kriadojn, eĉ publike propagandas pri la t.n. "*pre-emptive war*" (milito iniciativa). Lastatempe en siaj programoj por la prezidanto-elektado, ambaŭ la Respublika kaj Demokratia Partioj eĉ senhonte proklamas ke ili pretas "intense kaj kuraĝe peni" en ekspansio de armado kaj starigi "detenan militpotencon". Ĉiuj ĉi tiuj faktoj pruvas ke la usona imperiismo ne volas malarmadon. Nur se la popoloj de la tuta mondo pli firme unuigas sin, interligiĝas en unueca fronto por batali persiste kontraŭ la usona imperiismo kaj decideme frakasi ĝiajn agresan kaj militan politikojn, ebliĝos tiam devigi la usonan imperiismon serioze konsideri nian malarman proponon kaj eksidi por intertrakti kun ni pri la malarma problemo.

Kamaradoj, amikoj: la nuna internacia situacio estas tre favora al la lukto de la japana popolo. Bolas nun la kontraŭimperiisma, kontraŭkoloniisma, naciisma kaj demokratia movado de la aziaj, afrikaj kaj latinamerikaj popoloj; ekspansias kaj disvolviĝas ĉiutage la lukto de la popoloj de okcidentaj landoj, inkluzive tiun de Usono, kontraŭ nova militminaco kaj por defendo de la mondpaco. La granda gvidanto de la ĉina popolo, Prezidanto Maŭ diris: "Esperplena estas la perspektivo por la sendependeco kaj libereco de Japanio." Ni profunde kredas, ke la lukto de la japana popolo por forigi la usonajn militbazojn, nuligi la Japania-Usonan Militaliancan Traktaton, por sendependeco, demokratio, paco kaj neŭtraleco, nepre sukcesos forbalai ĉiujn obstaklojn, marŝi antaŭen kaj akiri finfinan, kompletan venkon, kun la forta subteno de la tutmondaj popoloj.

La ĉina popolo elkore deziras al la 6-a Tutmonda Konferenco kontraŭ A. kaj H. Bomboj kaj por Totala Malarmado novajn pli grandajn sukcesojn, kaj deziras al diverslandaj popoloj pluan plifortigon kaj disvolvadon de la amikeco kaj solidareco inter ili.

Vivu la venko de la komuna afero de la tutmondaj popoloj por kontraŭbatali la imperiisman agresadon kaj defendi la mondpacon!

Salutparolo al la Tria Tutlanda Kongreso de Literaturaj kaj Artaj Laborantoj de k-do Lu Dingji en la nomo de la Centra Komitato de la Ĉina Komunista Partio kaj la Ŝtata Konsilo

De la 22-a de julio ĝis la 13-a de aŭgusto okazis en Pekino la Tria Tutlanda Kongreso de Literaturaj kaj Artaj Laborantoj, kiun ĉeestis 2300 literaturaj kaj artaj laborantoj el diversaj provincoj, municipaloj, aŭtonomaj regionoj, rekte direktataj institucioj de la Centra Popola Registaro kaj la Popola Liberiga Armeo. La kongreso resumis la grandajn atingojn kaj riĉajn spertojn akiritajn en literaturaj kaj artaj laboroj dum la lastaj jaroj, pli klare difinis la disvolvan vojon de socialismaj literaturo kaj arto kaj pridiskutis kaj fiksis la taskojn por la venonteco. Por helpi la legantojn iom informiĝi pri la atingoj de ĉinaj socialismaj literaturaj kaj artaj laboroj, ni publikigas en tiu ĉi numero du el la paroladoj faritaj al la kongreso. —*La Red.*

Delegitoj kaj kamaradoj:

En la nomo de la Centra Komitato de la Ĉina Komunista Partio kaj la Ŝtata Konsilo, mi varme salutas al ĉiuj delegitoj ĉeestantaj la Trian Tutlandan Kongreson de Literaturaj kaj Artaj Laborantoj, kaj la delegitoj kaj konsilantoj ĉeestantaj la Plivastigitan Konsilantaran Kunvenon de la Unuiĝo de Ĉinaj Verkistoj, la Kongreson de la Unuiĝo de Ĉinaj Teatraj Laborantoj, la Kongreson de la Unuiĝo de Ĉinaj Muzikistoj, la Kongreson de la Unuiĝo de Ĉinaj Artistoj, la Kongreson de Asocio de Ĉinaj Filmlaborantoj, la Plivastigitan Konsilantaran Kunvenon de la Unuiĝo de Ĉinaj Kjuji-laborantoj*, la Kongreson de la Ĉina Esplora Societo de Dancarto, la Plivastigitan Konsilantaran Kunvenon de la Ĉina Esplora Societo de Folkloraj Literaturo kaj Arto kaj la Kongreson de la Ĉina Fotografia Societo, kaj pere de vi al la profesiaj kaj amatoraj literaturaj kaj artaj laborantoj de la lando.

Depost la publikigo de la *Parolado ĉe la Jan-an-a Kunsido pri Literaturo kaj Arto* de Kamarado Maŭ Zedong, la revoluciaj literaturo kaj arto de nia lando ĉiam antaŭen marŝas firme laŭ la korekta direkto de servado al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj de la literaturo kaj arto. De dek unu jaroj post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko, ni persistas en efektivigado de la politikoj en literaturaj kaj artaj laboroj de la Partio, faris serion da bataloj kontraŭ burĝaj ideoj en literaturo kaj arto kaj purigis la vojon por la disvolviĝo de socialismaj literaturo kaj arto. Ni adoptis la politikon de samtempa disvolviĝo de cent floroj kaj konkura sinesprimo de cent skoloj; praktikas la sistemon de partopreno en produktaj laboroj de literaturaj kaj artaj laborantoj; pledas por la art-metodo de kombinado de revolucia realismo kun revolucia romantiko; aplikas la politikon de kritika akcepto kaj asimilado de la heredaĵoj de ĉinaj kaj fremdlandaj literaturo kaj arto, preni la kremon, forjeti la rekrementon kaj evoluigi novon el malnovo; kaj tiamaniere ebligis al niaj literaturaj kaj artaj laboroj fari grandan kontribuon al la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado de nia lando. Potenca armeo de literaturo kaj arto, kun literaturaj kaj artaj laborantoj de laborista klaso kiel ĝia spino, jam elkreskis. Tiu ĉi revolucia armeo



Lu Dingji salutanta la kongreson

de literaturo kaj arto, sub la gvidado de la Ĉina Komunista Partio kaj la standardo de marksism-leninismo kaj la Moskva Deklaracio, firme staras ĉefronte en la batalo kontraŭ imperiismo, moderna reviziismo kaj ĉiuj specoj de burĝaj pensoj, profunde eniris en la amasojn de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj jam produktis multajn elstarajn verkojn kun tre alta ideologia kaj arta nivelo, kiujn la ĉina popolo multe ŝatas. La literaturo kaj arto de nia lando jam fariĝis afero de la amasoj de la laboranta popolo. Milionoj da laboristoj kaj kamparanoj nun uzas la armilojn de literaturo kaj arto en siaj bataloj, en antaŭenpuŝado de produkto kaj en transformado de la socio. Ĉio ĉi tio markas grandan venkon de marksism-leninisma penso literatura-arta, kaj grandan venkon de la literatura-arta penso de Maŭ Zedong.

Literaturo kaj arto apartenas al la kategorio de ideologio kaj estas parto de la superstrukturo de socio. La teorio de historia materialismo diras al ni: la eblecoj de disvolvo de la sociaj produktaj fortoj estas senlimaj. La rilatoj de produktado nepre devas konformi al la bezonoj de disvolvado de la produktaj fortoj, kaj la superstrukturo nepre devas konformi al la bezonoj de la ekonomia bazo. La socialisma revolucio kaj socialisma konstruado de nia lando jam akiris grandegajn atingajojn en la pasintaj dek unu jaroj. En la Dua Sesio de la Oka Tutlanda Kongreso de la Ĉina Komunista Partio en 1958, la Centra Komitato de la Partio estrata de Kamarado Maŭ Zedong elmetis la ĝeneralan linion: streĉi plene la energion kaj strebi forte antaŭen por konstrui la socialismon multe, rapide, bone kaj ekonomie, kiu inkluzivas serion da politikoj de samtempa disvolvo. Tiu ĉi ĝenerala linio estas produktajo de kombino de la universala vero de marksism-leninismo kun la konkreta realajo en la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado de Ĉinio. Sub la brilo de la ĝenerala linio de la Partio, niaj popolamasoj kreis antaŭensaltegan rapidecon en disvolvado de socialisma konstruado kaj la organizan formon de la popola komunumo. La vastaj popolamasoj tra la tuta lando inspirate de la tri ruĝaj standardoj, nome: la ĝenerala linio, la antaŭensaltego kaj la popola komunumo, jam efektivigis kun grandaj revolucia entuziasmo kaj laborfervoro, kontinuan antaŭensaltegon en industria kaj agrikultura produktado. Sekve de la granda venko de la ĉina popolo en ekonomia konstruado kaj la starigo kaj firmigo de la kamparaj kaj urbaj popolaj komunumoj, jam venis alta tajdo de teknika revolucio kaj kultura revolucio. La granda ĉina popolo, plena de vivenergio kaj alta batalspirito, estas nun transformanta la postrestintecon de sia patrolando, karakterizatan per "unue malriĉeco, due malpleneco". Ja sur tiu ĉi bazo estas akirita la granda venko de niaj literaturo kaj arto. La afero de socialisma revolucio kaj socialisma konstruado de la ĉina popolo, kiel suno jus leviĝanta, havas senlime brilan estontecon. Ankaŭ la estonteco de la afero de niaj socialismaj literaturo kaj arto estas same tia.

Kvankam nia popolo jam gajnis grandajn venkojn, tamen ni neniel devas memkontentiĝi. Por efektivigi nian socialisman revolucion ĝisfunde sur la ekonomia, politika, ideologia kaj kultura frontoj kaj gajni plenan venkon, por konstrui nian landon en potencan socialisman landon kun moderna industrio, moderna agrikulturo kaj modernaj scienco kaj kulturo, kaj krei la materiajn kaj spiritajn kondiĉojn por nia estonta eniro en komunisman socion, ni devas ankoraŭ fari longtempan kaj penegan klopodadon. Niaj literaturaj kaj artaj laborantoj nepre devas ludi sian gravan rolon en la batalo por plenumi ĉi tiujn taskojn.

La plej grava tasko de niaj literaturaj kaj artaj laboroj estas uzi la armilon de literaturo kaj arto por ekstreme multe altigi la socialisman kaj komunisman konscion de la tuta popolo, kaj levi la nivelon de iliaj komunismaj moralaj kvalitoj. Por atingi tiun ĉi celon, longtempa kaj persista batalo kontraŭ burĝa ideologio devas esti farata. En nia lando, sekve de la gajno de la fundamenta venko en la socialisma revolucio sur la ekonomia fronto, decidaj venkoj estas gajnitaj ankaŭ en la socialisma revolucio sur la politika kaj ideologia frontoj en la bataloj kontraŭ la burĝaj dekstruloj en 1957 kaj kontraŭ la dekstremaj oportunistoj interne de la Partio en 1959. Sed ni neniel povas konsideri ke ni jam finplenumis la taskon de politika kaj ideologia batalado kontraŭ la burĝaro. Ĉar Ĉinio ankoraŭ estas postrestinta ekonomie kaj kulture, postrestajo de burĝaj rajtoj

neeviteble ankoraŭ ekzistos longe en la estonteco. La fremdaj imperiistoj, diversspecaj reakciuloj kaj modernaj reviziistoj estas klopodantaj tutforte disvastigi venenon de reakciaj ideoj. La burĝa mondkoncepto, la politikaj kaj ideologiaj influoj de la burĝaro kaj burĝaj intelektuloj, kaj la influo de burĝaj kaj et-burĝaj kutimoj ankoraŭ daŭre ekzistos longe kaj obstine sin manifestos en ĉiuj sferoj por veneni la amasojn kaj gejunulojn. La venenaj efikoj de burĝaj ideoj estos kompare malgrandaj, se ili renkontas reziston kaj batojn. Alie, ilia veneno povus doni tre malutilan efikon al la afero de socialismo kaj komunismo. Ili povus konfuzi la amasojn, precipe la junan generacion, kaj tiel malhelpi la antaŭenmarŝon de socialisma socio, aŭ eĉ degenerigi socialisman socion al kapitalismo. Tial, en socialisma socio, la politika kaj ideologia batalo inter la proletaro kaj la burĝaro daŭros longe, iam pliintense, iam malpli intense, ĝis la politikaj kaj ideologiaj influoj de la burĝaro estos komplete eliminitaj. En socialisma socio tre multaj novaj homoj certe estas edukitaj kun komunisma konscio kaj komunismaj moralaj kvalitoj. Sed estus ekstreme erare opinii, ke ĉiuj kiuj elkreskas en socialisma socio, nature havos socialisman kaj komunisman penson. Tia vidpunkto signifas pledi por aboli socialisman revolucion en la politika kaj ideologia sferoj, kaj sekve estas ekstreme malutila.

La abolo aŭ malintensigo de la socialisma revolucio en la politika kaj ideologia sferoj en socialisma socio estas ĝuste io esperata de la imperiistoj. Dulles, tiu reakcia ĉefulo de la usona imperiismo, faris antaŭ sia morto tri paroladojn — la parolado pri *Politiko por Malproksima Oriento* ĉe la Ĉambro de Komerco de Kalifornia Ŝtato je la 4-a de decembro, 1958; la atesto ĉe sekreta sesio de la Komitato pri Eksteraj Aferoj de la Domo de Reprezentantoj de Usono je la 28-a de januaro, 1959; kaj la parolado pri *La Funkcio de Leĝo en la Afero de Paco* en Premia Festeno de la Advokata Asocio de Novjork-ŝtato je la 31-a de januaro, 1959. En tiuj ĉi paroladoj, Dulles klare priskribis la malicegajn intrigojn de la usona imperiismo kontraŭ la socialismaj landoj. Dulles esprimis sian timon pri la situacio ke la orienta vento superas la okcidentan, kaj, ke la rilato de fortoj en la mondo ĉiam pli malfavoras al imperiismo. Malgraŭ tio, li esprimis, ke Usono ne nur ne intencas forlasi sian politikon de forto per armado-ekspansio kaj militpreparado, sed kiel aldonaĵo al la politiko de forto Usono ankaŭ "esperas kuraĝigi" "internan evoluon" de la socialisma tendaro kaj la socialismaj landoj, intencante estigi "pacan transformiĝon" de la socialisma tendaro kaj la socialismaj landoj al kapitalismo kaj atingi ĝian frenezan ambicion konservi kapitalismon kaj elimini socialismon.

Vi, kamaradoj povas vidi, ke la usonaj imperiistoj nun estas plenumantaj ĉi tiun politikon de Dulles hereditan, dume, la modernaj reviziistoj, reprezentaj de la Tito-kliko de Jugoslavio, estas fiksantaj siajn enlandajn kaj eksterlandajn politikojn konforme al la bezonoj de imperiismo. Tio ĉi pruvas, ke la moderna reviziismo estas produktajo de imperiismaj politikoj. Por servi al la imperiismaj politikoj, la modernaj reviziistoj deklaras, ke la tezoj de Lenin pri imperiismo kaj liaj principoj pri proletara revolucio kaj diktaturo de la proletaro estas jam eksmodaj. Ni ĉiam pledas por paca kunekzistado de landoj kun malsamaj sociaj sistemoj, kaj firme pledas por plifortigi la batalon de ĉiuj popoloj por defendi la mondpacon, kaj ni ĉiam faras nian plejeblon por tio. La modernaj reviziistoj, sub la ŝildo de la t. n. "aktiva kunekzistado", estas uzantaj burĝan pacifismon kaj la ideojn de burĝa hipokrita "humanismo" por konfuzi amasojn, ili estaş uzantaj individuismon por oponi al kolektivismo kaj la burĝan "teorion de homeco" por oponi al la marksism-leninismaj teorioj de klasbatalo, proletara revolucio kaj diktaturo de la proletaro. Ili intencas dissolvi per tiuj ĉi absurdaj ideoj la revolucian volon de la popolamasoj en ĉiuj landoj kaj malintensigi la revoluciajn batalojn de la popoloj de ĉiuj landoj, malklarigi la diferencon inter revolucio kaj kontraŭrevolucio, inter socialismo kaj kapitalismo kaj inter justaj militoj kaj maljustaj militoj, kaj disvastigi iluziojn pri imperiismo inter la popolo, vane provante igi ilin forlasi siajn batalojn kontraŭ imperiismo kaj ĉiuj reakciaj fortoj por tiel atingi la celon likvidi la revolucion. Estas tute klare, ke, se la modernaj reviziistoj sukcesus en siaj provoj, la popolo de la tuta mondo kaj la afero de monda revolucia suferus grandegajn perdojn. Ĉiuj, kiuj estas lojalaj al marksism-leninismo kaj la revolucia afero devas fortike unuiĝi, alte teni la marksism-leninisman revolucian standardon de la Moskva Deklaracio, kaj plene malkaŝi kaj frakasi la intrigojn kaj ruzajojn de la imperiistoj kaj modernaj reviziistoj. Al tiu ĉi grava kaj peniga batalo, la literaturaj kaj artaj laborantoj tra la tuta lando povas kaj devas kontribui siajn klopodojn.

Ni nepre devas plifortigi la unuiĝon de ĉiuj landoj en la socialisma tendaro kun Sovetio ĉe la kapo, kaj strikte prizorgi la justajn batalojn de la vastaj popolamasoj tra la tuta mondo por akiri la nacian emancipiĝon, demokration-liberecon, socian progreson kaj mondpacon. Ni nepre devas subteni la kontraŭ-imperiismajn, kontraŭ-koloniismajn batalojn de la popoloj en Azio, Afriko kaj Latinameriko, subteni la revoluciajn batalojn de la laboristoj, kamparanoj kaj progresemaj intelektuloj en la imperiismaj landoj, subteni la batalon de ĉiuj popoloj tra la tuta mondo por defendi pacon, kaj lukti por starigi vastan unuiĝ-fronton kontraŭ la imperiisma tendaro estrata de la usona imperiismo.

Niaj revoluciaj literaturo kaj arto estas ĉiam strikte en servo al politiko kaj fidele servas la aferon

de popola revolucio. Ni nepre devas daŭre konservi kaj disvolvi tiun ĉi gloran tradicion. Por ke literaturo kaj arto pli bone servu ĉinajn socialisman revolucion kaj socialisman konstruadon, kaj pli bone servu la batalon kontraŭ imperiismo kaj moderna reviziismo, la literaturaj kaj artaj laborantoj devas levi sian nivelon de marksism-leninisma kompreno ankoraŭ pli alte, studi fervore marksism-leninismon kaj verkojn de Kamarado Maŭ Zedong, iri profunden inter la laboristojn, kamparanojn kaj soldatojn, partopreni produktajn laborojn kaj aktualajn batalojn, konstante remuldi sian ideologion kaj senĉese altigi siajn komunisman konscion kaj komunismajn moralajn kvalitojn, firme starigi proletan mondkoncepton kaj kontinue purigi siajn vicojn de burĝaj politikaj kaj ideologiaj influoj.

Nia politiko de samtempa disvolviĝo de cent floroj kaj konkura sinesprimo de cent skoloj estas tute korekta ne nur en teorio, sed ankaŭ pruviĝis tia en praktikado; difinita de Kamarado Maŭ Zedong laŭ ĉinaj aktualaj kondiĉoj, ĝi estas la plej bona politiko por disvolvi la sciencon, literaturon kaj arton en nia lando. Post sia elmetiĝo, ĝi renkontis oponon de la dogmistoj kaj suferis distordon de la imperiistoj, reakciuloj kaj modernaj reviziistoj. Iuj diris ke samtempa disvolviĝo de cent floroj kaj konkura sinesprimo de cent skoloj estas burĝa "liberaligo", t. e. doni al la reprezentantoj de la burĝaro la liberon vaste disvastigi sian vidpunkton, lasi burĝajn ideojn disflori libere kaj kunekzistadi kun burĝaj ideoj. Post kiam la burĝaj dekstruloj ricevis kaporompan rebaton en 1957, la imperiistoj, reakciuloj kaj modernaj reviziistoj tiam diradis, ke ni jam "forlasis" aŭ "reviziis" la nomitan politikon. Tio estas ilia afero, ke la imperiistoj, reakciuloj kaj modernaj reviziistoj interpretis nian politikon, tiele aŭ alimaniere. Ni, revoluciaj literaturaj kaj artaj laborantoj ĉiam havas nian korektan komprenon pri la Partiaj politikoj. Ni ĉiam diris, ke estas politika kriterio por samtempa disvolviĝo de cent floroj kaj konkura sinesprimo de cent skoloj, t. e. la politika kriterio de socialismo kaj komunismo. Kio estas la malutilo en praktiko de la nomita politiko sub la politika kriterio de socialismo kaj komunismo? La solaj personoj, kiuj oponas al la politiko de samtempa disvolviĝo de cent floroj kaj konkura sinesprimo de cent skoloj, estas nur tiuj, kiuj neas la diversecon de la mondo kaj la diversecon de formoj, subjektoj kaj stiloj en literaturo kaj arto, kaj neas la fakton ke tre diversforma kaj senfina estas la disvolvado de scienco. Ambaŭ la proleta ideologio de la plejmulto de la popolo kaj la burĝa ideologio de iuj personoj estas objektivaj realaĵoj en socialisma socio. Estas neeble forigi burĝan ideologion per administra dekreto. Nur per daŭra kaj ripetata batalado la burĝaj politikaj kaj ideologiaj influoj povas esti, paŝon post paŝo, elradikitaj. Kiam ni praktikas la politikon de samtempa disvolviĝo de cent floroj kaj konkura sinesprimo de cent skoloj interne de la popolo, burĝa ideologio profitos la okazon por elpuŝi sin. Tiam, pere de plena kritiko kaj refuto al reakcia burĝa ideologio povos esti harditaj kaj edukitaj la amasoj de intelektuloj, pliakrigita ilia politika sentumo, pli facile remuldita la ideologio de burĝaj intelektuloj mem, kaj forsarkitaj la venenaj herbaĉoj por ilin ŝanĝi en sterkon por la aromaj floroj, rezultigante ke la lastaj kresku ankoraŭ pli prospere. Kio estas timinda en ĉi ĉio? Tiu ĉi politiko helpas al la burĝaj intelektuloj en sia memremuldo. Kio estas la malavantaĝa en tio eĉ por la burĝaj intelektuloj?

La politiko de samtempa disvolviĝo de cent floroj kaj konkura sinesprimo de cent skoloj, estas esence la amasa linio en la kampoj de literaturo, arto kaj scienco. Sub la socialisma sistemo, la laboroj de literaturo, arto kaj scienco devas sekvi la amasan linion, sed ne la linion de ekskluziva kaj unuflanka dependo al specialistoj. Estas erare kaj malkorekte fari alimaniere. Oni jam klare vidas, ke dank' al la praktikado de tiu ĉi politiko multiĝis la formoj, subjektoj kaj stiloj en la socialismaj literaturo kaj arto de nia lando, aperis grandnombre novaj verkistoj kaj artistoj, pli kaj pli ŝrumpis la merkato de burĝa ideologio kaj burĝaj literaturo kaj arto, kaj estas anstataŭita la burĝa sistemo de arbitra administrado de specialistoj, kiu malhelpis la glatan progresadon de literaturaj kaj artaj laboroj, per la nova sistemo de demokratia administrado en kiu la amasoj kaj specialistoj estas kombinitaj sub la gvido de la Partia komitato. En la estonteco, ni nepre daŭre persistos en plenumo de la politiko de samtempa disvolviĝo de cent floroj kaj konkura sinesprimo de cent skoloj, kiu estas neŝanĝebla

Haven-laboristo Huang Ŝenghiaŭ fariĝis ŝatata poeto dank' al sia diligenta lernado. Jen li deklamas sian verkon al laboristoj. *Foto de Ding Zunhin*

klasa politiko de nia Partio. Ĝi garantios la senĉesan altiĝon de la nivelo de konscio de nia tuta popolo, kaj la glatan progresadon de literauro, arto kaj scienco, kaj garantios, ke nia penso neniam rigidiĝus, kaj droniĝus en erarojn de dogmismo kaj reviziismo.

Estas neimageble ke literaturaj kaj artaj laborantoj, kiuj volas priskribi kaj servi la laboristojn, kamparanojn kaj soldatojn, povas tion fari sen riĉaj spertoj pri la vivo de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. Spertoj pruvas, ke nur irinte en fabrikojn, vilaĝojn kaj armeajn trupojn, vivante la vivon de ordinaraj laborantoj, partoprenante en fizika laboro kaj praktika aktivado, kaj dividante la samajn sorton, ĝojojn kaj malĝojojn kun la amasoj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, literaturaj kaj artaj laborantoj povas radikale remuldi sian mondkoncepton, firme starigi proletan mondkoncepton, kaj akiri riĉan kaj multkoloran krud-materialon por literaturo kaj arto, esti familiara kun la lingvo de la laboranta popolo kaj krei bonajn revoluciajn verkojn de literaturo kaj arto. Iuj personoj kun burĝaj ideoj nomis tiun ĉi korektan metodon en trejnado de proleaj literaturaj kaj artaj laborantoj "misuzo de artistaj talentoj". Tio estas absoluta eraro. Niaj literaturaj kaj artaj laborantoj nepre devas daŭre plenumi la direktivojn de la Centra Komitato de la Ĉina Komunista Partio kaj Kamarado Maŭ Zedong, tutkore iri inter la laboristojn, kamparanojn kaj soldatojn kaj en la intensan batalon—la solan, plej vastan kaj riĉan fonton de kreado, entuziasme prikanti la novajn aferojn kaj novajn heroojn kaj prezenti la batalojn de la revoluciaj novnaskitaj aferoj kontraŭ la malnovaj aferoj, kiuj malhelpas la antaŭenmarŝon de la revolucio, por tiel servi la grandan aferon de socialismo kaj komunismo.

Fortike unuiĝu la literaturaj kaj artaj laborantoj de nia lando sub la revolucia standardo de marksismleninismo kaj sub la brila gvidado de la Centra Komitato de la Ĉina Komunista Partio kaj Kamarado Maŭ Zedong, strebante por plue disvolvi kaj levi la literaturon kaj arton de Ĉinio!

Brile prosperadu la socialismaj literaturo kaj arto de nia lando tagon post tago!

Vivu la revoluciaj literaturo kaj arto!

---

* *Kjuji-o: speco de ĉina popola literaturo inkluzivanta diversformajn kantrakontojn, humor-dialogon k.s.*

KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KU

Tutlanda Subteno al Agrikulturo

Por garantii kontinuan antaŭensalton de agrikultura produktado, nun disvolviĝas movado por aktive subteni agrikulturon en la industria, financa, komerca, kultura, eduka k. a. sferoj tra tuta Ĉinio.

La amasmovado de industrio en helpado al agrikulturo nun jam eniras en novan stadion. Ekzemple en Siĉuan-provinco, laŭ nekompleta statistiko, nun pli ol duono de la guberniaj kaj supergubernaj entreprenoj starigis fiksan rilaton kun diverslokaj popolaj komunumoj, per subskribo de kontraktoj pri longdaŭra helpado kaj helpis ilin establi pli ol 22,000 fabrikojn por produkti agrikulturajn instrumentojn, ĥemiajn sterkojn, agrikulturajn drogojn k.t.p., trejnis por ili cent milojn da teknikistoj kaj multe altigis la teknikajn ekipajojn de popolaj komunumoj.

Oficistoj kaj laboristoj de ĉiuj financaj kaj komercaj brancoj ankaŭ ĉiu-rimede subtenas agrikulturon. Ekde la somero komercaj brancoj de Gilin-provinco jam provizis al la kamparo grandnombron da agrikulturaj, drenaj kaj irigaciaj maŝinoj, instrumentoj por agrikulturaj drogoj kaj pli ol 23,000 tunojn da ĥemiaj sterkoj kaj agrikulturaj drogoj. La financaj instancoj de ĉiuj lokoj ĝustatempe kaj grandsume liveris agrikulturajn pruntdonojn kaj senpagajn investojn por helpi la komunumojn solvi problemon de kapitalo

Ankaŭ la instancoj kulturaj, edukaj, sciencaj kaj similaj diversmaniere subtenas la kamparon por rapidigi agrikulturan teknikan renovigon. Ekde februaro de la kuranta jaro, Ŝenjang-a Agrikultura Instituto elsendis pli ol 2,300 profesorojn kaj studentojn al popolaj komunumoj en la vasta kamparo de Liaŭning-provinco, por disvolvi tie diversmaniere agadon subtenantan agrikulturan teknikan renovigon interligante ĝin kun siaj lernejaj taskoj.

Artefarita Pluvo de la Popola Aeroarmeo

Ĉi-jare en iuj agrikulturaj regionoj okazis senpluveco. Por helpi kamparan popolan komunumon kontraŭbatali la senpluvecon, la Ĉina Popola Liberiga Armeo uzis sian teknikan kapablon farante artefaritan pluvon en regionoj suferantaj severan trosekecon. En iu regiono pli ol 56,000,000 kubmetroj da akvo estis faligitaj sur areo de 6,400 kvadrataj kilometroj. En alia regiono, akvo falinta sur areo de 110,000 kvadrataj kilometroj atingis mezkvante 5-10 milimetrojn, en iuj gubernioj — 24 milimetrojn. Kaj en iuj lokoj, la pluvado daŭris 2 horojn kaj 48 minutojn, kun pluvkvanto de pli ol 30 milimetroj. Artefarita pluvo sur tiom granda areo relative moderigis la trosekecon de tiuj regionoj kaj instigis produktan fervoron de la kamparanoj.

Vojo de Socialismaj Literaturo kaj Arto

Resumo de la raporto farita de Ĝoŭ Jang en la 3-a Tutlanda Kongreso de Literaturaj kaj Artaj Laborantoj

Ĝoŭ Jang, vicprezidanto de la Ĉina Federacio de Literaturistaj kaj Artistaj Rondoj faris la 22 an de julio, 1960, detalan raporton kun titolo *Vojo de Socialismaj Literaturo kaj Arto,* en la Tria Tutlanda Kongreso de Literaturaj kaj Artaj Laborantoj.

En la raporto li skizis tre gravajn sukcesojn kaj tre riĉajn spertojn akiritajn en la laboroj de literaturo kaj arto de Ĉinio, ekde la unua kongreso okazinta en julio de 1949, kaj la dua kongreso en septembro de 1953, precipe ekde la granda antaŭensalto en ĉiuj flankoj de la tutlanda socialisma konstruado. Li montris ke la literaturo kaj arto jam fariĝis komuna afero por la vasta popolo de ĉiuj nacioj en la lando, la revoluciaj literaturo kaj arto jam enpenetris en la korojn de la popolamasoj, multaj literaturaj kaj artaj kreajoj havas fortan kaj klaran karakteron de revolucio kaj batalemo, elskulptis verajn figurojn de la herooj el popolamasoj. La literaturo kaj arto pli kaj pli karakterizas sin per nacieco kaj popularеco. La praktiko pruvis: la direkto de servado al laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj la politiko, "samtempa disvolviĝo de cent floroj kaj konkura sinesprimo de cent skoloj", difinitaj de la Partia Centro kaj Prezidanto Maŭ estas ĝusta vojo por disvolvi kaj prosperigi nian socialismajn literaturon kaj arton.

Tuj sekve li detale eksplikis la problemon de la direkto de la literaturo kaj arto servi al laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. Li diris ke la laborist-kamparan-soldata direkto malfermis al la literaturo kaj arto novan mondon, ebligante al la verkistoj kaj artistoj trovi novajn temojn, novajn objektojn de esprimado kaj servado. Tio estas la direkto de disvolviĝo de la literaturo kaj arto de la homaro kaj granda revolucio en la literaturo kaj arto. Servado al laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj en la nuna tempo estas servado al la socialisma afero, por kiu sin okupas milionoj da popolanoj, al la Ĝenerala Linio de la Partio, al la komunisma morgaŭo kaj al la nobla afero kontraŭ imperiismo kaj por la longdaŭra paco. K-do Maŭ Zedong disvolvis originale la principon de Lenin pri la literaturo de la Partio, kaj solvis ĝisfunde la problemon de kunligo de la literaturo kaj arto kun laboristoj kaj kamparanoj. K-do Maŭ Zedong metis la centron de ĉiuj problemoj sur la fundamentan problemon de kunligiĝo de literaturaj kaj artaj laborantoj kun laboristaj kaj kamparanaj amasoj, por tiel reformi sian mondkoncepton. Ĝoŭ Jang montris ke literaturaj kaj artaj laborantoj povas bone koni la vivon, senton kaj lingvon de la laboristoj kaj kamparanoj, elskribi vivecajn verkojn fidele esprimantajn la laboristojn kaj kamparanojn, kaj reformi sian malnovan mondkoncepton de intelektulaj verkistoj kaj artistoj devenantaj de neproletaj familioj en tiun de komunismo, por fariĝi, kiel en la nomo tiel en la vero, verkistoj kaj artistoj de la laborista klaso, nur tiam, kiam ili enprofundiĝas en la amason de laboristoj kaj kamparanoj, partoprenas produktan laboron kaj praktikan batalon, kaj transformas sin en laboristojn kaj kamparanojn. Eĉ la literaturaj kaj artaj laborantoj devenantaj de laboristaj kaj kamparanaj familioj aŭ tiuj de juna generacio kulturitaj en la nova socio egale devas esti senĉese reformataj kaj partopreni produktan laboron, alie ili ne povus elteni la atakon de la kapitalisma ideologio kaj surirus vojon eraran aŭ eĉ reakcian. Tial laboristigo kaj kamparanigo de la literaturaj kaj artaj laborantoj estas la baza ŝlosilo de la laborist-kamparan-soldata direkto de literaturo kaj arto.

Ĝoŭ Jang donis ĝeneralan rakonton de serio da bataloj kontraŭ la burĝa ideologio faritaj sur la literatura-arta fronto en la pasintaj dek jaroj, kaj montris ke tiuj bataloj balais la vojon por libera disvolviĝo de la socialismaj literaturo kaj arto. Por plene efektivigi la direkton de literaturo kaj arto en servo al laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, estas necese senĉese batali kontraŭ la moderna reviziismo kaj ĉiuj specoj de la burĝa ideo. Tio estas longdaŭra tasko sur la ideologia fronto.

Li emfaze eksplikis en sia raporto la politikon "samtempa disvolviĝo de cent floroj kaj konkura

sinesprimo de cent skoloj" de la Partio kaj la prosperan staton de ĉiuflanka kaj diversforma disvolviĝo en ĉiuj literaturaj kaj artaj branĉoj sub la gvido de tiu ĉi politiko. Li montris ke laŭ la direkto de servado al laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj al socialisma afero, "samtempa disvolviĝo de cent floroj kaj konkura sinesprimo de cent skoloj" kaj "evoluigi novon el malnovo" estas la vojo plej korekta, plej vasta kaj plej kreiva por disvolvi la socialismajn literaturon kaj arton. Tiu ĉi vojo kondukas la tutan talenton kaj kreemon de verkistoj kaj artistoj de malsamaj skoloj kaj de malsamaj stiloj al unu komuna granda celo, kaj kombinas la individuan sagon de verkistoj kaj artistoj kun la kolektiva sago de la amaso. Li refutis la malican distordon de la reviziistoj pri la politiko "samtempa disvolviĝo de cent floroj kaj konkura sinesprimo de cent skoloj" kaj kritikis la eraran komprenon de la dogmistoj pri la samo. Li montris ke la dogmistoj ne komprenas la dialektikon, ne rekonas la diversecon de la mondo, kaj permesas nur sole flori unu floron, sed ne kune flori cent florojn. Tio estas tre malutila. Ni devas kuraĝigi diversecon en la stilo, formo kaj temo de la arto, stimuli liberan kreadon, kaj oponi kontraŭ unuformeco. Nia principo estas unuiĝo de unueco en la politika direkto kun la diverseco de l' artstiloj. Nur arto diversforma povas kontentigi la diversajn bezonojn de la amaso, pli bone servi al la revolucia politiko, kaj ebligi disvolvon de malsamaj individuecoj kaj talentoj de la literaturaj kaj artaj laborantoj. Koncerne al la problemoj de pensado en scienco kaj arto, ni devas oponi kontraŭ arbitra konkludo, perforta subigo kaj kruda kritiko, kaj subtenis plenan diskutadon por atingi paŝon post paŝo la ĝustan konkludon.

Ĝoŭ Jang faras raporton al la kongreso

Ĝoŭ Jang emfaze montris ke akra diferenco ekzistas inter ni kaj la reviziistoj, ĉu en la direkto kaj vojo, ĉu en la metodo de la literaturo kaj arto. Kaj tio, finfine, estas diferenco inter du radikale malsamaj politikaj linioj, kaj tiu inter du malsamaj mondkonceptoj. Li forte kondamnis la reviziistojn kiuj nun distrumpetas la burĝajn trompajojn, nome: burĝan homecon, burĝan falsan humanismon, burĝan pacifismon k. s. strebante tutforte harmoniigi kontraŭstaron de la klasoj, nei klasbatalon kaj revolucion, disvastigi iluzion pri imperiismo, por atingi sian kriman celon protekti la malnovan mondon kapitalisman. Li montris ke la tezo pri homeco estas la ĉefa ideologia batalilo de la reviziistoj, kiuj klarigas ĉiujn fenomenojn, historiajn kaj sociajn per la abstrakta komuna homeco, prenante homecon aŭ "humanismon" kiel moralan kaj artan normon, oponante kontraŭ alpreno de literaturo kiel revolucia instrumento de la proletaro, kaj oponas al la popola justa kaj revolucia milito laŭ la vidpunkto de homeco, kaj sub tiu ĉi influo de reviziisma penso, iuj literaturaj verkoj kaj filmoj priskribis revolucian militon plena de mornaj scenoj, ege distordante la historion de revoluciaj militoj. Tio montris nur ke la aŭtoroj estas teruritaj de militminaco de imperiismo, tiel ke ili forlasis la starpunkton, sur kiu ĉiu revolucia verkisto devas stari kaj fariĝis kaptitoj de la atom-ĉantaĝa politiko de imperiismo. Tia verko povas nur teruri la popolon, paralizi ĝian batalspiriton, senigi ĝin je memfido pri sia propra forto kaj estonteco, kaj neniom helpas al la granda afero de defendo kaj firmigo de la paco. Ĝoŭ Jang diris ke la moderna reviziisto oponas kontraŭ la historia materialismo per la historia ideismo, kontraŭ klasbatalo per klasharmonio, kontraŭ la teorio de klaso per tiu de homeco, kaj kontraŭ la revolucia homeco de la proleta klaso per la putriĝinta homeco de la burĝa klaso. Ĉio ĉi tio estas la reakcia esenco de la teorio de homeco de la reviziistoj.

Ĝoŭ Jang ankaŭ parolis en sia raporto pri la problemo kiel kritike akcepti la heredajojn de literaturo kaj arto, montrante ke marksistoj prenas la sintenon de kritika akcepto de ĉia heredajo, kaj oponas al blinda kulto al ĝi. Niaj literaturaj kaj artaj laborantoj devas lerni de ĉiuj bonaj heredajoj literaturaj kaj artaj, tiel de enlando kiel de eksterlando, sed la lernado ne devas nin limigi kaj mal-

helpi nian kreemon. Ni devas lerni de niaj antaŭuloj. Tamen ni ne devas blinde bagateligi nin mem, sed kuraĝi superi ilin.

Parolante pri la arta metodo de kombinado de la revolucia realismo kaj la revolucia romantiko, Ĝaŭ Jang montris ke tiu ĉi metodo aplikas la principon de kombinado de revolucia spirito kun la realista teniĝo al la literaturo kaj arto, dialektike unuigante la du artajn metodojn de realismo kaj romantiko en literaturo kaj arto, por pli bone prezenti la heroan epokon kaj heroajn figurojn de la popolamaso, pli komplete heredi ĉiujn bonajn tradiciojn de la literaturaj kaj artaj heredaĵoj, kaj pli bone disvolvi la malsamajn individuecojn kaj stilojn de la verkistoj kaj artistoj. La revolucia romantiko estas, esence, la revolucia idealismo. Nia literaturo devas krei figurojn en kiuj plej bone enkarniĝas la revolucia idealo de la proletaro. La modernaj reviziistoj atakas niajn literaturon kaj arton ĝuste pro tio ke ili malamegas la revolucian tendencecon en niaj literaturo kaj arto. Ili intence kontraŭstarigas la tendencecon kontraŭ la vereco kaj ekskludas progreseman idealon en la vivo. Ilia tiel nomta "realismo" estas realismo sen idealo, fakte ne estas realismo sed aĉa, triviala naturalismo kaj dekadencismo. Ĝoŭ Jang refutis la atakojn de la reviziistoj kontraŭ la socialisma realismo, montrarnte ke niaj literaturo kaj arto devas pli alte disvolvi la spiriton de socialismo kaj komunismo, verkistoj kaj artistoj devas, stari sur la pinto de la plej alta idealo de tiu ĉi epoko, la komunismo, por observi kaj priskribi la vivon, strebante antaŭenpuŝi la socion.

Fine, Ĝoŭ Jang elmetis estontajn taskojn de la literaturaj kaj artaj laborantoj:

Unue. Firma kaj pli bona efektivigo de la linio en literaturo kaj arto de K-do Maŭ Zedong, tio estas la linio "samtempa disvolviĝo de cent floroj kaj konkura sinesprimo de cent skoloj" kaj "evoluigi novon el malnovo" en la direkto de servado al laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj al la socialisma afero; la linio de kombinado de popularigo kaj altigo en literaturo kaj arto; la linio de unuiĝo de literaturaj kaj artaj laborantoj kun la laborist-kamparana amaso. Samtempe la principo de komandado de politiko devas esti efektivigata persiste en literaturaj kaj artaj laboroj, kaj la Partia gvidado en literaturo kaj arto devas esti plifortigata.

Due. Literaturaj kaj artaj laborantoj devas firme stari ĉe la plej antaŭa fronto de socialisma kaj komunisma konstruado kaj ĉe la plej antaŭa fronto kontraŭ imperiismo kaj la moderna reviziismo. Ili devas speguli la revolucian batalon de nia popolo kaj la popoloj de la mondo per diversaj literaturaj kaj artaj bataliloj. Ili devas intime sin unuigi kun la socialismaj literaturistoj kaj artistoj de Sovetio kaj aliaj frataj landoj, altgrade disvolvi la proletan internaciisman spiriton, kaj lerni iliajn progresintajn spertojn. Ili devas intime sin unuigi kun ĉiuj patriotaj, progresemaj kaj revoluciaj verkistoj kaj artistoj de la tuta mondo, precipe kun tiuj de Azio, Afriko kaj Latinameriko, en la komuna batalo kontraŭ imperiismo kaj en defendo de mondpaco, kaj formi vastan, revolucian unuiĝintan fronton de literaturo kaj arto por batali kontraŭ imperiismo kun Usono ĉe ĝia kapo kaj ĝiaj reakciaj aliancanoj en diversaj landoj. Ni devas daŭre disvolvi batalon kontraŭ la moderna reviziismo kaj ĉiuj reakciaj, burĝaj ideologioj, kontraŭ la reakcia, putriĝinta kulturo de usona imperiismo kaj ĝia malutila influo. La batalo kontraŭ la burĝa ideologio estas longdaŭra tasko. Estas ne permeseblaj forlaso kaj neglekto de tiu ĉi batalo, nek la sinteno de alkonformiĝo kaj kompromiso al la burĝa ideologio.

Trie. La amasa linio devas esti plene efektivigata. La movado por amatoraj literaturaj kaj artaj aktivecoj ĉe la amasoj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj devas esti aktive disvolvata. Estu kuraĝigataj la amaso al kreado kaj la literaturaj kaj artaj profesiuloj al kunlaboro kun la amaso de laboristoj kaj kamparanoj en kreado, kaj altgrade disvolvata la spirito de kolektivismo en la kampo de literaturo kaj arto. Ni devas speciale turni nian atenton al disvolvo de la literaturo kaj arto de niaj diversaj frataj nacioj, por ke nia literatura kaj arta tereno fariĝu granda, multnacia, brile bunta ĝardeno de socialismaj literaturo kaj arto.

Kvare. La literaturaj kaj artaj laborantoj devas multe klopodi por altigi sian ideologian kaj literaturan-artan kulturitecon, serioze studi marksism-leninismon kaj la verkojn de K-do Maŭ Zedong, kaj samtempe plialtigi senĉese sian artan lertecon, dekoble kaj centoble altigi siajn ideologian kaj artan nivelojn, kaj klopodi laŭ sia plejeblo por krei literaturajn kaj artajn verkojn emociantajn milojn kaj milionojn da popolanoj.

Kvine. Aktive disvolvi la marksism-leninisman teorion kaj kritikon de literaturo kaj arto, riĉan je batalspirito kaj kreemo, por akceli sanan disvolvon de la kreado, kaj helpi al la popolo plialtigi ilian kapablon de kritiko kaj aprezado de la arto. Kaj krome oni devas bone atenti pri kulturado de novaj fortoj de literatura-artaj teorio kaj kritiko kaj klopodi fondi trupon de marksisma literatura-arta teorio.

Sese. Plifortigo de la laboroj de ĉiuj asocioj kaj ligoj de literaturo kaj artoj, por ke ĉiu el ili fariĝu

la plej vigla batalanta unuo sur la literatura-arta fronto de la laborista klaso. Ĉiu literatura-arta grupo devas ludi sian aktivan rolon en organizado de verkistoj kaj artistoj en ilia kreado, lernado, fiziklaborado kaj enpenetrado en ĉiujn flankojn de la amasa vivo.

Ĝoŭ Jang diris kun emfazo ĉe la fino de sia raporto, ke se nur ni klopodas sub gvidado de la Partio, esti ĉiam fidela al la afero de la Partio kaj popolo, konservi ĉiam la revolucian viglecon, kunspiri ĉiam kun la amaso de laboristoj kaj kamparanoj, senĉese lernadi kaj senĉese levi nian nivelon ĉiuflanke, ni povos certe plenumi la taskon, kiun la historio asignis al ni, kaj krei verkojn indajn al la granda heroa epoko.

Trejnado de Altgradaj Agrikulturaj Teknikistoj Rapidigata

La nombro de agrikulturaj altlernejoj en tuta Ĉinio jam kreskis de 28 en jaro 1957 ĝis 97 hodiaŭ, kaj en plejparto de subprovincoj de la tuta lando jam establiĝis propraj agrikulturaj altlernejoj. En la lastaj du jaroj tiuj lernejoj liveris proksimume dek milojn da altgradaj agrikulturaj teknikistoj al la lando kaj tio efike helpas la grandan antaŭensalton de agrikultura produkto.

Diverstipaj trejn-kursoj aranĝitaj de la Ĉina Akademio de Agrikultura Scienco en la lasta jaro edukis por diversaj lokoj pli ol dek milojn da agrikulturaj teknikistoj. Lasttempe ĝi decidis, krome, establi en la kuranta jaro Ĉinan Agrikulturan Scienc-teknikan Universitaton kaj 18 agrikulturajn kolegiojn kaj mezlernejojn.

Samtempe kun disvolvo kaj altigo de tuttaga alta agrikultura edukado, oni en diversaj lokoj ankaŭ grandskale entreprenas postlaboran altan agrikulturan edukadon. Ekzemple en la urbo Ljuŝun-Dalian ekde lasta marto ĝis nun jam fondiĝis 14 postlaboraj kamparanaj universitatoj, kolegioj kaj kursoj. Ankaŭ la regulaj altaj agrikulturaj institutoj aŭ lernejoj trejnis grandnombre surpostenajn agrikulturajn teknikistojn pere de korespondaj kaj vesperaj kursoj.

Amasa Naĝado

En somero de la kuranta jaro en diversaj lokoj de Ĉinio disvolviĝas amasa naĝ-sporto. Komisiono de Fizika Kulturo kaj Sportoj, Ministerio de Edukado kaj Ligo de Ĉinaj Komunistaj Junuloj jam en junio eldonis kunan komunikon pri aktiva disvolvado de naĝ-sporto inter junuloj kaj infanoj. Nun en multaj provincoj kaj urboj jam establiĝis ĝenerala direktejo de naĝsporto.

Riveroj, lagoj kaj maroj estas plene utiligataj kiel naturaj naĝejoj en ĉiuj lokoj. En multaj grandaj urboj apud Jangzi-rivero kaj aliaj grandaj riveroj oni organizos konkursojn de transnaĝo. En Kinhuangdaŭ okazis mobiliza kunveno por naĝado en la maro, 24-an de julio. Tutage en tri diversaj lokoj entute 100,000 personaj partoprenis la naĝadon en la maro.

La 9-jara knabo Feng Ĝilian estas unu el la 480 transnaĝintoj de la 4 kilometrojn larĝa Jangzi-rivero en Giangsu-provinco.

Foto de Vej Lian



Lian Hua:

La movado por teknika renovigo en Ĉinio

Planante por la jaro en printempo,
miraklojn kreante en renovigo,
modernan, indiĝenan kombinante,
ni produktadon levas ĝis la ĉielo.

Tiu ĉi estas poemo skribita de Hju Minghu, laboristo de Junjan-a Fabriko de Ĥemiaj Maŝinoj kaj Aparatoj, en Gujjang. La poemo, kvankam mallonga, spegulas la grandan imponecon kaj skalon de la movado por teknika renovigo kaj teknika revolucio, kiu disvastiĝas nun en Ĉinio, kaj manifestas la heroecon de la ĉinaj laboristoj.

Grandskala amasmovado

En la unua printempo de la sesdekaj jaroj, disvolviĝas impeta tajdo de la movado por teknika renovigo kaj teknika revolucio tra la vastaj urboj kaj kamparo de Ĉinio, en ĉiuj branĉoj de la nacia ekonomio kaj en ĉiuj profesiaj fakoj. Tiu ĉi tutpopola amasmovado, superis ĉiujn ceterajn, kiuj okazis dum la lastaj jaroj en la produktado kaj konstruado, ĉu rilate la imponecon kaj skalon, ĉu rilate la amplekson kaj efikon.

Frue, en majo de 1958, en la dua sesio de la Oka Kongreso de la Ĉina Komunista Partio jam estis prezentita al la tuta popolo la tasko de realigo de la teknika revolucio. Al tiu ĉi alvoko tuj kaj varme respondis la vastaj popolamasoj. En la pasintaj du jaroj, la teknika renovigo kaj teknika revolucio akiris grandajn sukcesojn kaj fariĝis unu el la gravaj faktoroj por la daŭraj grandaj antaŭensaltoj de la industrio kaj agrikulturo en Ĉinio. Sur tiu ĉi bazo, la movado por teknika renovigo kaj teknika revolucio de Ĉinio ekiris, en 1960, en novan etapon, t. e. en novan etapon de teknika renovigo kaj teknika revolucio kun mekanikigo, duonmekanikigo, aŭtomatigo kaj duonaŭtomatigo kiel centro, kaj kun plirapidigo de teknika transformado de industrio kaj agrikulturo kiel celo.

Hodiaŭ, la ĉefa tasko de la movado estas mekanikigi kaj duonmekanikigi la manlaborojn. En ĉiuj branĉoj de la ekonomio tra la lando, tiel en industrio kaj agrikulturo, kiel en transportado kaj komerco, oni jam komencis agadi kaj grandskale marŝi al mekanikigo kaj duonmekanikigo. Tio multe plialtigis la laborefikon, ŝparis grandan nombron da labormanoj kaj liberigis la laboristojn de pezaj korpaj laboroj. Laŭ la stato en la unua trimestro de la kuranta jaro, sole, ni jam povas vidi, ke tiu ĉi movado gajnis tre bonajn rezultojn. En Ŝanhajo, kiel ekzemple, en 1958 nur 27% de la laboroj en la industriaj entreprenoj estis mekanike farataj. En 1959 tiu ĉi cifero altiĝis ĝis 35% kaj en la pasinta marto, la proporcio de la laboroj mekanikigitaj kaj duonmekanikigitaj leviĝis ĝis ĉirkaŭ 80%. En Gilin-provinco, post nur pli ol du monatoj da penado ĉijare, la nombro de laboristoj, kiuj sin okupas per manlaboroj en la industrio, reduktiĝis per 38% kompare kun la jarkomenco, kaj dekmiloj da personoj liberiĝis de la pezaj korplaboroj. La proporcio de la laboroj mekanikigitaj ankaŭ konsiderinde pligrandiĝis en Ĉongking, Tajjuan, Ŝenjang, Kantono kaj aliaj urboj.

Dank' al konstruo de indiĝena fervojo kaj instalo de rubando-transportilo la havenlaboristoj de Bengfu-haveno liberiĝis de multaj pezaj laboroj. *Foto de Ĝang Ven-li*



De manlabora fabriko al moderna fabriko

Tiuj profesiaj fakoj, en kiuj oni laboris mane ĝis nun, ankaŭ komencis sin mekanikigi, duonmekanikigi kaj eĉ aŭtomatigi. Ekzemple, en farado de ŝtofaj ŝuoj oni jam nun ekuzas maŝinojn. Hingtaj-ŝufabriko, en Hebej-provinco, kreis, kopiis kaj perfektigis 20 specojn da maŝinoj, kiaj maŝinoj por fari plandumojn, por plandumi ŝuojn, k. a., ke estas mekanikigitaj kaj duonmekanikigitaj 17 ĉefaj laborprocedoj, dank' al kio 82% de la laboroj estas mekanike farataj. Tio plialtigis ĉirkaŭ dekoble la laboran produktivecon kaj multe malpliigis la produktan koston.



Tiu ĉi aŭtomata linio manipulata de du laboristoj, povanta plenumi 34 -60 laborprocedojn sur la cilindrobloko, estas unu el la 191 aŭtomataj produktolinioj kreitaj de la laboristoj de la Unua Aŭtomobila Fabriko de Ĉangĉun.

Foto de Ĵen Ŝijin

La movado por teknika renovigo kaj teknika revolucio akiris grandajn sukcesojn ne nur en ordinaraj fabrikoj, sed ankaŭ en la grandaj kaj modernaj entreprenoj. En 1958 kaj 1959, dum la granda antaŭensalto, la laboristoj kaj oficistoj de la Unua Aŭtomobila Fabriko de Ĉangĉun, kiu estas ekipita per tute modernaj instalajoj kaj tute novaj teknikoj, renovigis ĉiuflanke la instalajojn, la teknologion kaj la projektadon de produktoj, kaj tiel duobligis la produktan kapablon de la fabriko sen plimultigo de la instalajoj. Nun la kapablo de la plejparto de la instalajoj de la fabriko atingis aŭ superis la produktan kvanton de 150 aŭtomobiloj po labordejoro; kaj la kapablo de preskaŭ 30% de la produktaj instalajoj atingis kvinoblon de la originale projektita kapablo. Multaj similaj ekzemploj estas citeblaj.

Batalo por mekanikigi kaj elektrigi agrikulturon en ĉ. 10 jaroj

En agrikulturo, Ĉinio celas, paŝon post paŝo, ĝin mekanikigi kaj elektrigi plene en ĉirkaŭ dek jaroj. La movado por teknika renovigo kaj teknika revolucio en agrikulturo konsistas nun ĉefe en reformo de instrumentoj, kaj ankaŭ en laŭplana kaj laŭgrada anstataŭigo de manlaboroj per indiĝena mekanikigo kaj duona mekanikigo. Tio kreos fundamenton por efektivigi teknikan transformon en agrikulturo.

Kuiristoj de la manĝejo de Ĉungking-a Fer-ŝtala Fabriko elfaris pastopecigan maŝinon, kiu povas fari 320 pastopecojn en ĉiu minuto. La bildo montras la maŝinon en funkcio.

Foto de Luo Ziguang



Nun la statistikistino de Ŝu-fabriko en Mudangiang, Hejlongĝiang-provinco, plenumas sian taskon pli bone kaj pli rapide dank' al uzo de sia memfarita rapid-kalkulilo.

Foto Baj Zongji

Laŭ statistikaj ciferoj, en 1958 kaj 1959 la ĉefaj novtipaj agrikulturaj instrumentoj inventitaj kaj plibonigitaj en la tuta lando nombris pli ol cent specojn, kaj pli ol 210 milionoj da plibonigitaj agrikulturaj instrumentoj estis disvastigitaj. Tiuj instrumentoj ludis grandan rolon en akcelo de produktado kaj en levado de laborefiko.

En la nuna momento, la movado por teknika renovigo kaj teknika revolucio rapide disvolviĝas en ĉiujn branĉojn de la agrikultura produktado. Tra la tuta lando, precipe en la rizregionoj en la sudo, oni entreprenas viglan kampanjon por ĝeneraligi la uzadon de riztransplantaj maŝinoj. Ekde nun, la transplantado de rizo, kiun la ĉinaj kamparanoj faradis dum miloj da jaroj ĝibigante la dorson, estos plenumata per diverstipaj riztransplantaj maŝinoj.

En porkobredado, unu el la plej gravaj flankokupoj en la agrikulturo, ne malmultloke oni nun efektivigis perĉaran transportadon kaj mekanikan kaj duonmekanikan dispecigon de furaĝo kaj grandan nombron da aliaj renovigoj en la bredmetodoj kaj nutroinstrumentoj, kio alte levis la laborefikon kaj reduktis la bezonatajn labormanojn. En multaj lokoj oni energie sin dediĉas al teknika renovigo de prilaborado de teo kaj duonmekanikigis la tutan proceson de la primara prilaborado. En iuj lokoj, la renovigo de instrumentoj por silkraŭpa bredado oble plialtigis la laborefikon.

Mekanikaj en- kaj mal-ŝarĝo anstataŭ la ŝultra kaj dorsa portado

La ĉefa enhavo de la movado por teknika renovigo kaj teknika revolucio en la komunika kaj transporta fakoj konsistas en la reformo de la instrumentoj por enŝarĝo kaj malŝarĝo, por malpliigi la laborintensecon de la transportlaboristoj, ŝpari labormanojn kaj plirapidigi la cirkuladon de la veturiloj kaj ŝipoj. En la urboj Ŝanhajo, Tiangin kaj Kingdaŭ, dank' al plialtigo de mekanikigo de la en- kaj mal-ŝarĝo en la havenoj, la pezaj korpolaboroj jam estas plejparte eliminitaj. En ĉiuj havenoj mezgrandaj kaj malgrandaj tra la lando, la amasmovado por renovigo de en- kaj mal-ŝarĝo ankaŭ pli profunde disvolviĝas pluen, kun la celo plejparte forigi ĉi-jare la portadon sur ŝultro kaj dorso. La teknika renovigo kaj teknika revolucio en la fakoj de fervoja kaj ŝosea transportado ankaŭ impetas antaŭen kaj multe atingis.

Dispecigi legomojn sen tranĉilo, lavi legomojn sen mano

Por servi pli bone al la industria kaj agrikultura produktado kaj al la popola vivo, la laboristoj kaj oficistoj en komercaj fakoj kuraĝe renovigas la instrumentojn kaj senĉese plibonigas la teknikon en siaj laboroj, kio multe levis la laborefikon kaj la kvaliton de la servado. De la lasta jaro ĝis nun, la ĉefaj sukcesoj akiritaj en la teknika renovigo kaj teknika revolucio en la komercaj fakoj centriĝe manifestiĝis en la plibonigo de instrumentoj kaj ekipajoj. Laŭ nekompleta statistiko, pli ol 1,710,000 instrumentoj kaj ekipajoj estas plibonigitaj. Ni prenu la manĝkaj trink-servan fakon kiel ekzemplon. En la restoracioj en multaj urboj grandaj kaj mezgrandaj, la knedado de faruno, lavado de rizo, tranĉado de legomoj kaj viando, purigo de ujoj kaj iloj, transportado de manĝajoj kaj aliaj laboroj farataj per manoj jam estas relative ĝenerale anstataŭigitaj per aparatoj kaj maŝinoj. Ekzemple, la laboristoj kaj oficistoj de Hjuhuj-restoracio en Ŝanhajo kreis 25 mekanikajojn kaj duonmekanikajojn, kaj unuapaŝe efektivigis dispecigon de legomoj sen tranĉilo, lavadon de legomoj sen mano, mendon de pladoj sen parolo, transporto de manĝajoj sen piediro. . .

En laborhoroj produktadas, post laborhoroj renovigas

En tiu ĉi grandioza amasmovado ĉiuj montras sin entuziasmaj. Multaj "en laborhoroj produktadas, post laborhoroj renovigas". Iuj eĉ fariĝis "renovigmaniuloj" kiuj cerbumas pri la renovigo irante, manĝante kaj sonĝante. Aperis en la movado grand-

nombre "renovigaj lertuloj". Ni citu kelkajn ekzemplojn: Li Enpu, maljuna laboristo de Dalian-a Levmaŝina Fabriko, post daŭra studado kaj eksperimentado helpe de aliaj laboristoj kaj teknikistoj, sukcesis krei per indiĝenaj rimedoj aŭtomatan rabotmaŝinon por kvar facoj, kies laborefiko estas 40-oble pli alta ol tiu de du modernaj rabotmaŝinoj kune laborantaj. Kamparanino Lin Ŝujing kuraĝe enkondukis bonspecajn silkraŭpojn de aliaj lokoj, serioze lernis kaj plibonigis la bredan teknikon, kaj fojon post fojo levis la kokonan produktkvanton. Sekve de tio ŝi fariĝis fama labormodelo de silkraŭpa bredado. Vej Fengjing, stamppremistino de Nordorienta Maŝinfabriko, estas ordinara juna laboristino, sed ŝi kreis sinsekvon da mirakloj. Dum malpli ol ses jaroj ŝi faris 127 teknikajn renovigojn, plenumis la laborkvanton por la Unua Kvinjara Plano je 434 tagoj antaŭ la fiksita dato, kaj en kvar monatoj ŝi antaŭdate finfaris la laborkvanton por la Dua Kvinjara Plano. Nun ŝi estas laboranta por la jaro 1969.



Bambuplektajojn oni produktas per nova maŝino inventita de laborantoj en Tajgiang-fabriko de konstrumaterialoj en Fuĝoŭ.

Kun la disvastiĝo kaj profundiĝo de la movado por teknika renovigo kaj teknika revolucio, multaj entreprenoj industriaj kaj minaj en diversaj lokoj tra la lando amase anoncas siajn sukcesojn pri la plenumo de la monataj, trimestraj kaj ĉi-jaraj planoj antaŭ la dato fiksita, kiel bone priskribas la jena kanto "Pro la svarma sukcesanoncad ":

Tamburoj kaj tamtamoj
Rompiĝas ĉiutage de frapad',
Ne kulpas la kvalito,
Sed pro la svrma sukcesanoncad'.

Liu Duking kaj Pan Juguo:

Mirinda Replantilo

DUM la rizreplanta sezono ĉijare, samkiel siaj kamparanaj fratoj en la tuta provinco, la membroj de la Tangtoŭ-a Popola Komunumo ĉe la okcidenta bordo de Vu-rivero sur la Gujĝoŭ-altebenaĵo komencis teknikan revolucion en agrikulturo, kies ĉefa tasko estas enkonduki la instrumenton por replanti elkreskaĵojn de rizo. Centoj da tiaj instrumentoj ekfunkciis en la kampoj dum la plej strecа replantado. Sur altajoj aŭ ebenaĵoj, deklivoj aŭ montetoj, ĉie disfamiĝis rakontoj pri mirindaĵoj de la replantiloj. Ĉiuj unuvoĉe laŭdis la ilon kiel "trezoron en la kampo", dirante, ke sub la gvidado de la Kompartio kaj Prezidanto Maŭ eĉ tiel nomataj "kotaj kruroj" kiel ili ja fariĝas pli kaj pli saĝaj.

Verdire, kelkaj el la parolintoj antaŭ duona monato ankoraŭ skuadis siajn kapojn apud la kampoj, kriante ke la replantilo nur estas "infanludilo", "vana laboro". En la unua tago de la replantado, kelkaj junulinoj, nome, Peng Deĝen, Ĉen Kifen k. a. jam frumatene transportis al la kamporandoj du replantilojn de la tipo: "Tongjen-a Plibonigita Liling n-ro 3". Ili sin okupis per lavado de la plantidoj kaj

enmetado de ili en la replantilojn, gaje kantante popolkantojn:

La replantilo vere estas floro,
Tangtoŭ-fraŭlinoj kun ĝi enamiĝas;
tapiŝon verdan teksas lertaj manoj,
aŭtune la rikolt' grenejon rompos.

Neatendite venis de malproksime Ŝuj Tingfu, la maljuna replantmajstro famkonata en Tangtoŭ, kiu kun plena memfido pri sia majstreco en replantado, lastjare eĉ rigardon ne jetis al la instrumento. Li alproksimiĝis kaj ŝerce ilin alparolis:

"Fratinetoj, kiel facile estas planti per la manoj libermove! Kial vi preferas puŝi tiun ĉi lignan keston tra la kampoj? Tio ja estas rajdante ĉevalon porti pakaĵon sursultre — senbezone!"

"Replanti per ilo estas pli rapide, oni povas ellasi plantidojn en dekdu kavojn je unu puŝo. Volu ĝin provi antaŭ ol konkludi, avo!"

"Estas facile por diri. Kiam vi malsukcesos, kio povos vin helpi krom niaj manoj." Tion dirante, Ŝuj Tingfu supren faldis sian pantalonon, kaj paŝis en la kampon. Preninte manplenon da plantidoj, li anoncis ke li volas konkuri kun la replantilo. Jen komencis la replanta majstro en pozo de rajdanto, per ambaŭ okuloj li rigardante antaŭen kaj kun ambaŭ manoj rapide plantante. En malpli ol unu minuto, li jam plantis en ĉirkaŭ tridek kavojn.

Vidante ke la maljunulo ne intencis ŝercon, la knabinoj tuj movis la instrumenton, kaj en momento ili jam estis fore antaŭ Ŝuj Tingfu, lasinte la plantidojn starantaj simetrie, firme kaj bonorde. Preskaŭ duonhore daŭris la konkurado, kiam la maljunulo memvole ĉesis, frapante al si la talion kaj anhelante cedis, "Lasu min provi ankaŭ la replantilon". Tiam Peng Deĝen tuj lernigis lin, prenante lin je la mano. Ŝuj Tingfu ridante diris:

Transplantiloj de la tipo Gianghi N-ro 59 en laboro.

"Estas senbezone ĉagreniĝi pri la replantado ĉijare, almenaŭ unu monaton pli frue tio finiĝos."

Estas kaŭzo por tiu diro. Ĉe Tangtoŭ-a Komunumo de Sinan-gubernio troviĝas Bagiaŭ-ebenajo, kie la popolo suferas malsekecon, ĉiujare en la sesa monato laŭ la luna kalendaro. Antaŭe, pro nesufiĉo de labormanoj kaj malrapideco en replantado, la laboron oni povis fini nur ĉe l' fino de la kvina monato. Per la replantilo, oni ĉijare povas plimultigi la rikolton je ĉ. dek mil ĝin-oj, nur dank' al ĝustatempa replantado.

En kelkaj tagoj, la novajo pri la subiĝo de la replanta majstro al la replantilo post la konkuro disvastiĝis forforen kaj pli kaj pli da homoj interesiĝis pri la replanta instrumento. Por ke la membroj estu firme konvinkitaj pri la avantaĝo de la instrumento, la Partia Komitato de la Komunumo tuj organizis vizitojn kaj praktikadojn sur la kampoj, diskonigante la utilon de la replantilo. Iuj diris, "La areo en kiu antaŭe ni finis permanan replantadon en dek tagoj, nun ni povas fini per la ilo en unu tago." Sed aliaj kontraŭis: "Nur rapideco ne utilas. Kion fari se malmultiĝos la rikolto?"

"Certa estos pliprodukto. Estas fakto ĉe ni por pruvo," refutis lakone junuloj el la Bagiaŭ-brigado. Jam en la pasinta jaro, Liu Ŝifen, la estrino de la Bagiaŭ-a Junula Brigado por produkto, provinca modelo en manipulado de replantilo kaj tutlanda "Marto-8-a" ruĝflago-tenantino, faris komparan eksperimenton inter il-plantado kaj manplantado. En du egalajn partojn oni dividis dek mu-ojn da rizkampo, kun sama grundo, sama akvumo kaj sama sterkado. Unu parton oni plantis per replantilo kaj la alian per manoj. La rikolto de la unua superis tion de la dua je tricent ĝin-oj, kaj meznombras naŭcent ĝin-ojn po mu-o. Iuj komunumanoj diris ankoraŭ, "pure hazarde!" La kialo de la pliprodukto restis enigmo por plejparto de la membraro. La Komunuma Ŝcienca-teknika Esplorejo kunvenigis ĉiujn spertajn kamparanojn en la Komunumo por fari esplorojn kaj analizojn ĉe-lokajn. Ili konkludis, ke estas du ĉefaj kialoj por la sukceso: unue, plantitaj per instrumentoj plantidoj staris neprofunde sed firme, kaj ĝenerarle reverdiĝis kaj ekkreskis ĉirkaŭ tri tagojn pli frue ol la manplantitaj kaj la maturiĝa periodo koincidis en ambaŭ kazoj; due, per replantiloj la interplantidaj spacoj estis pli regulaj, konforme al la densplanta normo, dum permane la interspacoj estis jen densaj, jen maldensaj. La replantiloj tiam enplantis pli ol dudek kvin mil kavojn da rizplantidoj po mu-o, dum la manoj nur ĉ. dekkvin mil ĝenerale. Kiel iras la diro: "Klara akvo fiŝojn en la fund' vidigas; kaj klerigas klara dir' la

menson." Tiel konvinkiĝis tiuj, kiuj antaŭe dubis ĉu replantado per instrumento alportos pliprodukton.

Tuj post kiam la avantaĝoj de la replanta instrumento fariĝis certaj kaj klaraj en la penso de tiuj, kiuj de generacio al generacio permane la elkreskajojn plantis kaj multege suferis de tiu spinkurbiga laboro, ektorentis rapide en Tangtoŭ la movado por konstrui kaj disvastigi la replantilojn. Ĉie aperis nova fenomeno, rimarkinda per tio, ke ĉiuj volas fariĝi saĝaj lignajistoj, ĉiuj ellernas uzi la replantilon. Kiam la lignajista laborejo komencis sturme konstrui tiujn instrumentojn, la sekretario de la Komunuma Parti-komitato laboris la unua kiel lignajisto, kaj iuj tutnokte daŭrigis la laboron. Nun de la komnuumaj Parti-komitatanoj ĝis la sekretarioj de laborgrupa Parti-filio, ĉiu havas unu replantilon. Estis hejmoj kiuj fariĝis "etaj laborejoj", ambaŭ geedzoj klopodis konstrui la ilon. La junuloj kaj junulinoj estas ĉefaj fortoj en la disvastigo de la replantilo. Unuj praktikis sub la lunlumo, aliaj eĉ parkere recitis la manipulajn regulojn en sia sonĝo. Li Ĉengbiaŭ, juna kuiristo de la komuna manĝejo, kiu dum ripozaj horoj uzante la replantilon praktikadis per pinofolioj kiel plantidoj sur tero kovrita per cindroj el la kuirejaj fornoj kiel la kampo, estis honorita per titolo de modelo kiam la Komunumo okazigis konkurson en manipulo de la replantilo.

En la tago antaŭ ol ni forlasis Tangtoŭ-komunumon, ni vidis, ke sur la kampoj, el kiuj ĵus la antaŭan tagon la tritiko kaj kolzo estis urĝrikoltitaj, nur post unu nokto, jam etendiĝis vasta areo da verdetaj plantidoj de rizo, kun akvo glata kiel spegulo kaj viclinioj rektaj kiel fadenoj. Tute ravite vere mirinde funkcias la replantilo.

Ĝu Gihin:

Senlime bona la urba popola komunumo

— Notoj pri Ĉunŝu-a Popola Komunumo, Pekino —

ESTAS ankoraŭ multaj malnovaj loĝkvartaloj en Pekino. Strateto post strateto zigzagas inter domo post domo de malnovaj loĝejoj. Tiuj, kiuj bone konas Pekinon, ĉiuj scias, ke tiuj loĝejoj ofte estas la tiel nomataj "grandaj miksloĝataj kortoj". Interne de unu pordego loĝas pluraj, ofte eĉ kelkdek familioj, el kies mastrinoj ĉiu prizorgas sian propran familian vivon. La tuto impresas per malordo. Ĉunŝu-strateto kaj ĝia ĉirkaŭaĵo en la sudokcidenta parto interne de la urba murego de Pekino estas unu el tiaj kvartaloj.

Sed de kiam fondiĝis tie popola komunumo en septembro de 1958, la fizionomio de tiu malnova loĝkvartalo multe ŝanĝiĝis, kaj disradias brilan junecon. Nun en iu ajn strateto, oni ĉiam aŭdas zumadon de laborantaj maŝinoj el multaj "grandaj miksloĝataj kortoj", kaj vidas multajn ferlamenojn, ŝtalladojn, vitrajn tubetojn, instrumentojn k. s. aŭ antaŭ iliaj pordoj aŭ en iliaj kortoj. Ĉie estas videblaj ŝildoj de fabrikoj, komunaj manĝejoj, infanĝardenoj, infanvartejoj, dommastrumaj servo-stacioj. Ĉiu ajn dommastrino diros al vi kun ne retenebla emocio, kian novan vivon nun ili vivas.

Ĉunŝu-a Popola Komunumo ampleksas la tutan kvadratecan loĝkvartalon de Ĉunŝu-strateto, kun pli ol 13,00 familioj kaj pli ol 56,000 loĝantoj. Antaŭ la fondiĝo de la komunumo pli ol 30,000 loĝantoj havis profesion aŭ vizitis lernejon. Inter la ceteraj, ekskluzive de maljunuloj, infanoj, suferantoj de longdaŭraj malsanoj, troviĝis pli ol 6,400 loĝantoj laborkapablaj, kiuj ne povis partopreni socian laboron nur pro ŝarĝo de dommastrumaj laboroj. La komunumo ĝermis ĝuste kun organizado de tiuj loĝantoj por partopreni produktadon.

Fabrikoj el malplenaj manoj

Iuvespere, dommastrino Ĝoŭ Ŝujing, loĝanta en n-ro 24 de Nanliu-strateto, rapideme venis al la Komitato de Loĝantoj, kaj diris al la ĉefkomitatano Baj Hiukin kun emocio: "Ĉu vi ne diris ke ni devas kontribui brikojn al la socialisma konstruado? Mi decidis kontribui por tio per miaj ŝparitaj kelkaj juanoj. Bonvolu aĉeti por mi brikojn kaj ilin transdoni al la registaro." Kaj ŝi tuj elprenis monpakon el la poŝo kaj ĝin donis al Baj.

Baj konfuziĝis por momento, sed tuj komprenis, kaj ridante repuŝis ŝian manon, klarigante: "Mi ja diris per tio, ke ni devas organiziĝi por partopreni produktadon kaj per tio kontribui al la patrio, sed ne ke ni oferu monon por aĉeti brikojn."

La klarigo iom hontigis Ĝoŭ Ŝujing. "Vere malsprita mi estas! Ŝtoniĝas la kapo kiam oni ĉiutage

Liberiĝinte de dommastrumaj bagatelajoj ĝoje kantas laboristinoj de la vitrofabriko de la popolkomunumo.

ĉirkaŭiras nur la kuirfornon. Bone, organiziĝi por produkti! Mi anoncas min por tio!"

"Ja bonvena estas via decido! Sed plej grave estas mobilizi la amason. . . ."

"Do mi sciigos la aliajn por kune interkonsiliĝi." interrompis Ĝoŭ.

Tiuvespere ok virinoj sin anoncis por partopreni produktajn laborojn. Sed kion produkti? Tiam iu malnova najbaro Ĉang Nianjaŭ, kiu laboras en iu kemia fabriko, konsilis ilin starigi malgrandan kemian fabrikon. Kaj tiel ili tuj ekagis.

La placeto ĉe n-ro 49 de Nanliu-strateto estis destinita kiel subĉiela laborejo de la malgranda kemia fabriko, kies tuta havajo konsistis el du grandaj fajencaj akvujoj pruntitaj de la Komitato de Loĝantoj, unu eluzita blovilo, kelkcent kilogramoj da karbo, kontribuita de la ok virinoj, kaj laborgantoj kaj aliaj laboriloj, kiujn ili aĉetis je 2.40 juanoj. La krudmaterialo estis forjetita sulfuracido donacita de la najbara dratfabriko kaj ferrubo donacita de iu ferajfabriko. Ili komencis per tio fabriki ferozan sulfuraton.

Estis tre varme en la komenca tago de produktado. La virinoj verŝis la forjetitan acidon en poton por varmigi kaj pene turnmovis la ferrubon en la acido per stangeto. La surkape brulanta sunbrilo bakis ilin ĝis tutkorpa ŝvitado. Sed neniu el ili tion atentis. Post kelkhora fervora klopodado estis fabrikita la unua kvanto da produktajo. La kvalito de la prorduktajo estis laŭnorma kiel provite. La fakto, ke ordinaraj dommastrinoj povis efektive fabriki kemiajon, multe ĝojigis ilin ĉiujn.

Ilia sukceso forte altiris la atenton de ĉirkaŭaj loĝantoj. Multaj venis pririgardi, kaj iuj meminiciate restis por partopreni la laboron. Tiel disvolviĝis la afero iom post iom. Kiam mi vizitis la fabrikon, mi ne povis kredi la suprediritan historion. La fabriko havas nun grandan areon da domoj kaj pli ol 300 laboristojn, kaj ĝi fabrikas kelkdek produktajojn. La menciita Ĝoŭ Ŝujing nun estas laborejestrino, gvidanta la produktajn laborojn de kelkdek laboristoj.

Preskaŭ ĉiuj fabrikoj de la komunumo tiel estiĝis kaj disvolviĝis el nenio. Nun la komunumo havas entute 18 fabrikojn, pli malpli regule organizitajn kaj ekipitajn, laŭ informo de ĝia respondeculo Liu Jong. Inter tiuj troviĝas fabrikoj de iom kompleksaj instrumentoj kaj vitrajoj kaj ankaŭ de lignajoj kaj vestajoj; kaj estas farunglua kaj estas farunglua fabriko kun tridek kelkaj laboristoj kaj ankaŭ fabriko de plastikaj objektoj kun pli ol 500 laboristoj. La direkto de tiuj fabrikoj estas servi al la grandaj fabrikoj, al la vivo de loĝantoj kaj al la urba konstruado. Ili fabrikas totale 159 produktajojn, inter kiuj estas precizaj instrumentoj, altkvalitaj tinkturiloj, belaj plastikaj pluvmanteloj, mansakoj ktp. La kresko de produktado estas mirinde rapida. La totala produktvaloro dum la posta duonjaro de 1958 estis ne pli ol 310,000 juanoj, tiu de la jaro 1959 kreskis ĝis 8,500,000 juanoj, kaj tiu de la unua sezono de la kuranta jaro saltis ĝis 12,600,000 juanoj. La komunumo asignis sumojn el la grandkvanta akumulajo por aĉeti pli ol 400 maŝinojn al diversaj fabrikoj, inter kiuj estis torniloj, rabotmaŝinoj, frezmaŝinoj, stampmaŝinoj k.a.

Garantii pri ĉio koncerne al dommastrumajoj

La popola komunumo jam nombras 5,700 personojn partoprenantajn en produktaj laboroj de la

Kuirejo de unu el la komunaj manĝejoj.

komunumaj fabrikoj aŭ aliajn sociajn laborojn. Ili plejparte estas dommastrinoj jus venintaj el sia domo. Nun, kiu zorgas la hejmajn aferojn por ili? Tio estas solvita laŭ la tiea populara diro "garantii pri ĉio". Jes, "garantii pri ĉio" ne estas afero simpla, ĝi necesigas tutan kompletan kaj efikan reton de servoj por prizorgi la ĉiutagan vivon. Tian la komunumo jam plejparte starigis, kiu konsistas el 23 komunaj manĝejoj, 76 organizaĵoj por infanprizorgo kaj 25 dommastrumaj servostacioj.

Tri grandaj, tute aŭ duone mekanikigitaj komunaj manĝejoj, en kiuj povas manĝi mil homoj, estas starigitaj tie, kie koncentre troviĝas fabrikoj. Multaj mezgrandaj kaj malgrandaj manĝejoj dense dislokiĝas ĉirkaŭe. La laborantoj ne bezonas longe iri por manĝi post laboro. Tiuj, kiuj manĝas en tiuj komunaj manĝejoj kaj infanoj, kiuj manĝas ĉe la infanprizorgaj organizajoj, kune nombriĝas pli ol 5,100.

La vastaj manĝsalonoj de Ŝanhi-strata Manĝejo, unu el la tri grandtipaj komunaj manĝejoj de la komunumo, estas kompareblaj kun tiuj de grandaj restoracioj. Dank' al mekanikigo de kuiraj instrumentoj, ĝiaj tridek kelkaj laborantoj povas servi al pli ol 1,800 manĝantojn. La kvalito de ĝiaj manĝaĵoj estas neniel dubinda. Mi vidis sur granda nigra tabulo menuon de kelkdek manĝaĵoj, laŭplaĉe mendeblaj. Estas apartaj manĝsalonoj por ĝeneralaj manĝantoj, por patrinoj kun infanoj, por hujoj (kiuj manĝas nur bovaĵon aŭ ŝafaĵon) kaj por gastantaj manĝantoj.

Paro de manĝantaj geedzoj diris, ke la manĝejo solvis tre ĝenan problemon de ilia familio. Antaŭe ili ambaŭ manĝis ĉe la institucioj, en kiuj ili laboras, kaj iliaj tri infanoj devas mem prepari manĝaĵojn post reveno de la lernejo. Tio multe ĝenas ilian lernadon, kaj cetere ili povis nur fuŝe prepari la manĝajojn. Ili ofte devis kontentiĝi pri manĝajoj ne sufiĉe kuiritaj, bruldifektitaj aŭ malvarmaj. Ĉiusabate la geedzoj devis sin okupadi ĉirkaŭ la kuirforno. Nun la granda manĝejo liveras de mateno ĝis vespero varmajn manĝaĵojn, malkarajn kaj bongustajn.

En la nomita manĝejo mi renkontis estrinon de iu infanĝardeno, Kin Hiuhiang, kiu invitis min viziti ŝian infanejon, kaj tion mi faris. Ĝi ja troviĝas tuj apud la manĝejo. Kelkdek infanoj estis ludantaj en la pura korto. En tualetejo vartistinoj sinokupis pri purigado de la kapoj por amaso da infanoj. Aliaj infanoj ludis per "konstruaj blokoj". La estrino informis min, ke la infanĝardeno bone atentas pri la higieno de la infanoj, kaj la nutrajoj estas bonaj, ke la infanoj multe peziĝis post eniro en la infanejon. Pro tio pluraj patrinoj esprimis dankon per opiniafiŝoj. Unu tian mi trovis en ŝia oficejo: "Antaŭ eniro en la infanĝardenon mia filineto Ĝang Gujjing havis malbonan sanon, agis malvigle, kondutis ne

Ĝang Ligeng, antaŭe dommastrino, nun lerta laboristino de plastikajoj.

ĝentile, tre malofte salutante al aliuloj, kaj ne atentis pri higieno. Sed ĉio ĉi tio ŝanĝiĝis iom post iom de post ŝia eniro en la infanejon. Ŝi jam estas grasa, vigla, ĝentila, purema kaj higiena infano. Ŝi eĉ lernis korpekzercadon, dancadon, kantadon kaj rakontadon."

La 16 laborantinoj de tiu infanejo plejparte estis dommastrinoj antaŭe. Nun, ili laborante sinklerigas pri infanedukado. Ĉiusemajne ili dediĉas duontagon por lerni sian profesion en la kurso organizita de la Urba Eduka Oficejo de Pekino.

La komunumo havas sume 76 infanvartejojn kaj infanĝardenojn, kiuj prizorgas entute pli ol 3,400 infanojn, kiujn ili akceptas, iuj nur tage aliaj pensione. La gepatroj pagas nur la manĝadon kaj loĝadon, la salajrojn kaj aliajn elspezojn ĉiujn pagas la komunumo.

Krom manĝopreparado kaj infanvartado la dommastrinon ĝenas ankoraŭ aliaj diversaj aferetoj, kiujn la membroj de Ĉunŝu-a Popola Komunumo povas komisii al la dommastrumaj stacioj. La loĝantoj nomas la laborantojn de la stacioj, kolektivaj intendantoj, ĉar ili povas prizorgi por vi ĉiujn

mastrumajn aferojn, kiujn vi povas imagi. Ĉiu stacio havas tabulon elpendigitan, sur kiu estas anoncataj la servotemoj, kiaj livero de boligita akvo, vestlavado, riparado de ŝuoj kaj ŝtrumpoj . . . . Se iuj aferoj ne troviĝas en la servotemaro, ne grave, nur diru, kaj la stacio klopodos vin kontentigi.

Okazis jeno al la Dommastruma Stacio de Kiugiastrato: Iuposttagmeze, kiam la juna staciestrino Geng Ĉunlian diskutis pri staciaj laboroj kun servantino onklino Vang, eniris de ekstere gravedulino, kiu malfacile paŝis al la telefonaparato, kaj telefone petis urĝeme la kunparolanton tuj revenigi hejmen sian edzon, ĉar ŝi estis baldaŭ akuŝonta. Sed la respondo estis, ke ŝia edzo forveturis aliloken pro urĝa tasko. Tiam Geng Ĉunlian iris al la maltrankviligita gravedulino kaj ŝin konsolis sincere: "Estu trankvila, vian malfacilajon nia stacio helpos solvi." La embarasita gravedulino estis kortuŝita ĝis larmoj de tiu varma propono. Sed la intermita dolorado jam tiel ŝin atakis, ke ŝi kapablis nenion eldiri. Evidente baldaŭ jam okazos la akuŝado. Geng Ĉunlian tuj sendis onklinon Vang por kuracisto, kaj mem zorgeme subtenis ŝin al ŝia hejmo, ĉar jam ne estis tempo por sendi ŝin al hospitalo.

En la kemia fabriko de Ĉunŝu-a Popola Komunumo estas produktataj kelk-dek kemiajoj.



Kiam vespere la edzo rapidis hejmen, li trovis ke sana fileto jam sekure naskiĝis, la akuŝintino kaj la bebo estis plej bone prizorgataj de la stacio kaj ĉio estas en bona ordo.

La servoj de la stacio estas tre malmultekostaj kaj iuj servoj estas ne mezureblaj per mono.

Nova fizionomio de granda miksloĝata korto

"Granda miksloĝata korto" farĝis granda familio, tiel konstatas ĉiuj membroj de Ĉunŝu-a Popola Komunumo.

Tia granda familio estas ankaŭ en n-ro 3, Mianhua-strateto I. Enirinte en la grandan miksloĝatan korton, oni trovas ke ĝi ĉie estas pure balaita kaj bone ordigita, kaj silento regas en la korto, kie loĝas 15 familioj kun 72 homoj. Ĉiuj laborkapablaj personoj estas okupataj per produktaj aŭ aliaj laboroj. La tridek kelkaj infanoj estas senditaj en infanĝardenojn kaj infanvartejojn. Dumtage restas en la korto nur kvar gemaljunuloj, al kiuj estas konfiditaj la ĉambroŝlosiloj de ĉiuj familioj. Ili zorgas pri eventualaj neatenditaj aferoj de tiuj familioj.

Tute ne estis tia tiu ĉi granda miksloĝata korto, antaŭ la fondiĝo de la komunumo. Tiam estis 17 laborkapablaj virinoj retenataj de domaferoj, kiuj intermalpaciĝis ofte pro bagatelajoj. Malpuraj akvo kaj rubajo estis ofte troveblaj en la korto kiun neniu prizorgis. La tajdo de popolkomunumigo portis ilin el la domo. Iuj fariĝis laboristinoj, aliaj vendistinoj aŭ vartistinoj. Ĝang Ŝumin, patrino de ses infanoj, fariĝis estrino de strata butiko de flankmanĝajoj. La 48-jara Guo Ĉunhua, kiu pasigis sian tutan vivon ĉirkaŭ la kuirforno, nun estas estrino de infanĝardeno.

Kiam mi renkontis tiujn virinojn, ĉiuj unuvoĉe certigis al mi, ke neniu nun en la korto kverelas, kaj la komunajn aferojn, kiaj purigaj kaj higienaj laboroj, oni konkurence faras memvole. La tuta korto efektive transformiĝis en grandan familion, kie regas interhelpemo kaj fratsento. Dank' al la partopreno de virinoj en sociaj laboroj, la enspezoj de la familioj kreskis, kaj ankaŭ la vivnivelo multe altiĝis. Nun inter la 15 familioj, 10 havas deponitan monon en banko. Lastjare la tuta korto aĉetis kune pli ol 150 vestajojn kaj litajojn, valorantajn pli ol 2,000 juanojn. Ili estis tiom kontentaj pri la komunumo, ke parolante kaj parolante pri ĝi ili ofte ĝoje ridis senĉese.

Ankoraŭ ne pasis du jaroj depost la fondiĝo de la komunumo, sed jam estas atingitaj tiom grandaj sukcesoj. Certe senlima estos ĝia estonta evoluo, kiel ĝuste konstatis la respondeculo de la komunumo Liu Jong: "La popola komunumo estas organizajo kun senlima vivpovo, kaj ni faris nun nur la unuan paŝon!"

Fotoj de Ĉu Jing

Fan kaj Feng:

NOVA VIVO, NOVA ENERGIO

En februaro de la kuranta jaro, en Pinglu-gubernio de Ŝanhi-provinco, sesdek unu volontulaj laboristoj ŝoseon konstruantaj subite veneniĝis pro manĝaĵo. Por ilin savi la Partia komitato de la gubernio faris ĉion eblan, sed la specialan medikamenton bezonatan por la kazo oni ne povis trovi eĉ en Tajjuan kaj aliaj najbaraj urboj, kaj finfine ili telefonis al la Ministerio de Higieno en Pekino por peti helpon. La Ministerio tuj havigis la medikamenton, kaj petis helpon de la aerarmeo por transporti kaj malsuprenĵeti ĝin per speciale sendita aeroplano. La laboristoj de apoteko alportis la medikamenton el tenejo en malproksima loko, elektrolaboristoj aktive helpis por instalo de lumigiloj sur la kesto de la medikamento por nokte faciligi la trovon post malsupreĵeto el aeroplano, la aerarmeo, malgraŭ diversaj malfaciloj, ĝustatempe jetis la keston al la destinita loko kaj tiel la sesdek unu klasfratoj estis savitaj de vivdanĝero kaj baldaŭ resaniĝis. La suba artikolo raportas al ni la vivon kaj laboron de la 61 volontulaj laboristoj post sia saviĝo. — *La red.*

GRANDAJ masoj da tero falas de la monteto. Sekvamomente, kontraŭ la ŝveliĝanta ternebulo, la volontulaj laboristoj antaŭenkuras kvazaŭ soldatoj sturmantaj. Iuj ŝarĝas kaj aliaj puŝas la ĉarojn. Tiam, la teknikisto, starante sur la monteto en la fronto, skuante ruĝan flagon, laŭte krias: "Kamaradoj, denove grandarea abunda rikolto!" Sintrovante meze de la bolanta konstruejo, oni neniel povus rimarki ke ĉi tie laboras neniuj aliaj ol "la sesdek unu klas-fratoj", grave veneniĝintaj antaŭ dekkelkaj tagoj.

En la lasta tagdeko de februaro, ni veturis suden el la urbo Tajjuan laŭ Datong-Puĝoŭ-a Fervojo, kaj transiris la torentan Flavan Riveron. Kaj poste transpasinte montarojn kaj krutegaĵojn, ni alvenis al la gubernio Pinglu, en la suda parto de Ŝanhi-provinco. Ĉi tie, jus pasis dekkelkaj tagoj post la intensa batalo por vivsavado, sed la venenigitaj volontulaj laboristoj jam ĉiuj resaniĝis, nun okupante ŝin en intensa laborkonkurso. El la sesdek unu fajre varmaj koroj disradias lumo de nova vivo. Revenante al la konstruejo post resaniĝo ili tuj deklaris: kun nova vivo, nova energio, ni estu herooj en monthakado kaj vojkonstruado, kaj plifruigi la plenumon de la plano je tri monatoj, omaĝe al la partio. Ĉiutage antaŭ tagiĝo ili jam venis al la konstruejo, kaj laboradis ĝis vespero je la oka aŭ naŭa. Kamarado Vang Venjue, la gvidanto de Ĝanggoŭ-sekcio de Fengnan-ŝoseo, kiu akompanis nin al la konstruejo, pasie diris al ni montrante la vivoplenajn batalantojn. "Vidu, jen la junulo, puŝanta ĉaron, estas la kapablulo de ilo-reformado, kaj tiu estas la iniciatinto de plibonigo de laboroganizo." Tuj poste, montrante maljunulon ŝovelantan teron sur la monteto, li daŭrigis: "Li estas Liu Baŭkjuan, kiu proponis metodon pri disrompo de tero po granda areo."

La malgrasa vizaĝo de Liu Baŭkjuan, estas plena de sulkoj. Li ne estas kadro, sed ĉiumatene antaŭ tagiĝo, li de loko al loko urĝas junulojn ellitiĝi kaj iri al laborejo. Dum ripozo li ĉiam pristudas kun siaj kamaradoj kiel plialtigi laborefikon kaj kiel plibonigi labormetodon. Laŭ lia propono oni disrompas teron po granda areo ĉe deklivo. Rezulte, la efiko tuj duobliĝis. Kvankam la aĝo de Liu Baŭkjuan jam superis 50 jarojn, sed dum laborado li neniom estas malsupera ol junuloj. Eĉ veneniĝinte, li ankoraŭ zorgis pri tio ke li eble ne povos labori en la sekvanta tago.

Rememorante la krizajn tagojn, oni profunde sentas la intimecon kaj varmecon en la homaj interrilatoj sub la socialisma sistemo. Ĝuste en la tago de veneniĝo kiam oni tute malesperis senhelpe, la sekretario de la Partia Komitato de Ĝangcun-a Popola Komunumo rapidis noktmeze al la konstruejo kun tridek kelkaj doktoroj. Kaj ili jen injektis, jen vomigis la venenigitojn, jen lavis vestojn de malsanuloj, jen trinkigis al ili supon de verda fazeolo. Por alporti la bezonatan medikamenton, iu sekcio de nia aerarmeo en la sekvinta nokto ekspedis aeroplanon



La "sesdek unu klasfratoj" en sturmado sur la vojkonstruejo. *Foto de Vu Ĝiĉang*

por ĝin malsuprenjeti. La volontulaj laboristoj diris poste: "La medikamento estas sendita de Prezidanto Maŭ, de la Partia Centro." Nun, ĉe mencio de tio, oni tuj sentas varmecon en la koro kaj energion por laboro.

Kiam ni vizitis la maljunulon Liu Baŭkjuan, la unua frazo kiun li diris, estis: "Sen la Partio, jam delonge ne plu vivus ni." Liu Baŭkjuan antaŭe venis de Henan-provinco al Pinglu-gubernio fuĝante de malsatego. Antaŭ la Liberiĝo, li laboradis ĉe bienulo kiel dungita kamplaboristo. Iun jaron lin atakis malario, duon-senkonsciiĝinte pro alta febro, li devis ankoraŭ treni sin al la kampo. Eĉ tiel, la bienulo ne estis kontenta pri li, volante lin forpeli pro lia "ŝajnigita" malsano. Li propraokule vidis la kruelan scenon de sia kune laboranta klasfrato forjetigita de la bienulo en rivereton, mortanta pro malsano. Liu Baŭkjuan neniel povis daŭrigi ĉi tie sian parolon. Post momento, li diris: "Sed tiun ĉi fojon, la Partio mian vivon savis, mi devas repagi la amon de Prezidanto Maŭ per mia eminenta laborrezulto."

La sesdek unu novaj vivoj fariĝas sesdek unu fontoj de ĉielontuŝanta energio. En la konstruejo ni aŭdis serion da kortuŝaj aferoj, pri sinoferemo por rapidigi la konstruadon de la ŝoseo. Kiam deksepjara Vu Guanghin veneniĝis, lia patro Vu Ginghi unuspire rapidis al la konstruejo por lin vidi de Gangdian-a Popola Komunumo je kvardek kilometroj malproksima. Enirinte la hospitalon, li ne povis trovi sian filon inter homoj malhelpate de svarmantaj vizitantoj. Li fariĝis des pli maltrankvila. Sed tuj la filo jam vidis sian patron, li kuris al li kaj diris rekte sen ia saluto: "Paĉjo! Prezidanto Maŭ jam nin savis el morto. Kial vi venis de tiel malproksime? Vidu, la guberniestro Guo, kaj la sekretario de Partia Komitato de la Komunumo ankaŭ venis por nin viziti. Ĉi tie ni estas pli sekuraj kaj pli multe zorgataj ol en la hejmo". Vidinte ke lia filo restas tiel forta kaj vigla kiel antaŭe, la maljunulo ĝojiĝis ĝis larmo, povante nenion eldiri. Tiam, amaso da kadroj kaj volontulaj laboristoj ĉirkaŭis lin kaj konsolis lin. La guberniestro Guo premis lian manon dirante: "Estu trankvila, onĉjo, en nia socialisma lando ĉie estas hejmo." La maljunulo respondis per admono al sia filo: "Guanghin, la Partio estas al vi pli kara ol viaj propraj gepatroj, sekvu la vorton de la Partio, ne hejmen revenu antaŭ ol finkonstrui la ŝoseon." La zorgemo de la Partio kaj la instigo de la patro donis al Guanghin senliman forton. Antaŭ la finiĝo de la ripoz-tempo, li jam petis reiri al la konstruejo. Li diris: "Fengnan-ŝoseo estas la arterio de la tuta gubernio. Se oni ĝin ne finkonstruus rapide, kaj la malnova ŝoseo estus detruota en inundperiodo de la Flava Rivero, tiam, per kio ni povus helpi la konstruadon ĉe Sanmen-montgorĝo?" La junulo eksaltis pro ĝojo, kiam li estis permesita reiri al la konstruejo. Reveninte, li serĉis ĉiel la plej efikan labormetodon. Li trovis la malnovan labormetodon de enĉariĝo de tero tro malrapida, pristudis la aferon kun siaj kamaradoj kaj elpensis novan metodon, ke la laboro de ŝarĝado kaj tirado de ĉaroj iras tiel rapide kiel stafeto.

La familia komedio inter Dong Hajguan kaj lia edzino disvastiĝis en la tuta konstruejo. Jene okazis la afero: Dong Hajguan estas serioza junulo, kiu ordinare scias nur sin profundigi plene en laboradon. Tiun ĉi fojon, li veneniĝis tre forte. Kiam li ĵus forlasis la hospitalon por rekomenci la laboron, li ricevis leteron de sia edzino, kiu informis lin ke ŝi malsaniĝis kaj petas lin tuj reiri hejmen. Unue li pensis ke li vere devas reiri, lia superulo ankaŭ tion konsilis al li. Tamen, pripensante la prizorgadon dum lia veneniĝo, kiun faris al li en ĉiuj detaloj la Partia Komitato kaj doktoroj, kaj konsiderante la urĝecon de la laboro en la konstruejo, li ekmetis la ŝpaton sur sian ŝultron kaj iris al la konstruejo. La bolanta konstruejo tute forgesigis al li la aferon kaj li tute ne atendis ke tio kolerigos la edzinon, kiu ofendite ĉesis sendi al Dong Hajguan la intencitajn por li novajn ŝuojn kaj ŝtrumpetojn. Informite pri la ofendiĝo de sia edzino, Dong Hajguan rapide skribis leteron al ŝi, sin senkulpigante: "Mi veneniĝis en la konstruejo, la Partia Centro kaj Prezidanto

Maŭ ekspedis aeroplanon por nin savi el morto. Pensu, ĉu estus eble al ni ankoraŭ kun vivi sen la Partio? Nun mi jam resaniĝis, kaj devas eklabori por ke ni povu regajni la tempon perditan. Vi devas scii ke unutaga foresto signifas malfruiĝo de elfosado de dekkvin kubmetroj de tero. . . ." Tre efike la letero tuŝis la koron de la edzino, kaj baldaŭ venis la ŝuoj kaj ŝtrumpetoj kun letero, en kiu ŝi gratulis Hajguan: "Mi ankaŭ resaniĝis, dank' al la kuracado de la komununa hospitalo. Ne zorgu pri mi! Diligente laboru en la konstruejo por repagi la amon de la Partio kaj Prezidanto Maŭ." En la konstruejo ni trovis la junulon laboranta vere energie: ŝpaton demetinte li tuj jam ekpuŝas ĉaron. Lia fortika korpo kaj ruĝa vizaĝo disradias vivforton de juneco.

Haŭ Ŝiŝan (la 2-a de dekstre), sekretario de la Partikomitato de Pinglu-gubernio alportas al la 61 klasfratoj varman zorgemon de la Partio.

Foto de Gu Dehua

La brilo de komunisma ideo elkreskigis grandiozan forton inter la popolo de la gubernio Pingflu. Ni vidis ke multaj volontulaj laboristoj kaj komunumanoj konservas kiel donacon senditan de Prezidanto Maŭ, ĉiun elektran ampolon, ĉiun pecon da tabulo kaj ĉiun skatolon de medikamento, per kiuj oni jetis la medikamenton el aeroplano. Ĉe ekrigardo al tiuj objektoj, ili sentas ke la tuta korpo tuj pleniĝas je energio. Kiam ni estis en Pinglu, la popolo de la tuta gubernio, sub la instigo de altgrada komunisma stilo de la popolo en la ĉefurbo, sin jetis en la kampanjon por kontraŭbatali sekecon. Industriaj fakoj jam faris drenajn kaj irigaciajn maŝinojn kiel eble plej baldaŭ por helpi en la batalo kontraŭ la sekeco. La prezidanto de sindiakato Li Venŝeng kaj la maljuna majstro Ren Zi-an de la gubernia maŝinfabriko, sciiĝinte ke tabulo mankas al la fabriko por produkti akvolevajn maŝinojn, tuj transdonis al ĝi siajn litotabulojn kaj ili mem dormas sur planko. La sekretario de la Partia Komitato de la fabriko timante ke tio malbone influus ilian sanon, ripete ilin malkonsilis. Tamen, ili respondis: "La aerarmeo kaj la popolo de la ĉefurbo ja sendis al ni la medikamenton tra nubaro kaj mallumo, ĉu estas grave, ke ni provizore dormu sen lito?" En tio plene evidentiĝas kiel la Partio zorgemas pri la popolo, kiel la interhelpa spirito de komunismo disvolviĝas kaj radias en la koro de la popolo. Ili jam plene dediĉas sian fidelan koron al la Partio, al la grandioza socialisma afero.

KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KU

Kampanjo de Teknika Renovigo en la Kamparo

En la vasta kamparo de Ĉinio nun prospere disvolviĝas kampanjo de teknika renovigo kaj teknika revolucio.

Ekzemple en Gilin-provinco tradiciaj kaj postiĝintaj instrumentoj kaj pezaj manlaboroj nun estas anstataŭataj de mekanikaj kaj duonmekanikaj instrumentoj. Ekde oktobro de 1959 ĝis nun en la tuta provinco oni jam kreis, plibonigis kaj fabrikis pli ol 490,000 duonmekanikajn kaj pli ol 4,000 mekanikajn agrikulturajn kaj aliajn instrumentojn. Krome estis aldonitaj ankaŭ motoroj kaj traktoroj kun sume pli ol 37,000 ĉevalpovoj. Nun en la provinco jam en pli ol 5,700 kamparaj manĝejoj (t. e. sesono de la tuto) efektiviĝis reformo de kuirejaj instrumentoj kaj realiĝis duonmekanikiĝo.

Kampanjo de reformo de instrumentoj en Siĉuan-provinco estas ankoraŭ pli vaste disvolvata. Tie en la unuaj 4 monatoj de la kuranta jaro estis jam fabrikitaj kaj disvastigitaj pli ol 6 milionoj da plibonigitaj kaj duonmekanikigitaj instrumentoj, t. e. kresko per 150% kompare kun la sama periodo de la pasinta jaro.

En ĉiuj komunumoj de Ningde-gubernio de Fugian-provinco vaste fondiĝis plug-stacioj kun novaj instrumentoj, kaj ili efike helpis disvastigon de novaj instrumentoj kaj efike rapidigis riztransplantadon, te-rikolton kaj printempan rikolton. En Lianjuan-gubernio de Hunan-provinco fondiĝis 5,350 meztipaj kaj ettipaj hidraŭlikaj stacioj, kaj ili estas ekipitaj per pli ol 11,000 diversspecaj maŝinoj kaj instrumentoj, dank' al kiuj oni plenumis laboron de 130,000 personoj per nur 16,000 personoj.

Sur la Ĝusta Vojo

—Skizo pri la ekspozicio de eduka reformo de Gingŝan- k. a. lernejoj en Pekino—

DUM la Tutlanda Kongreso de la Kulturaj kaj Edukaj Laborherooj, la Ekspozicio de Eduka Reformo estis okazigita de Gingŝan-lernejo kaj la Eksperimenta Lernejo de la Pekina Pedagogia Universitato en Pekino. Per vivaj faktoj la ekspozicio montris al la rigardantoj, ke edukado devas esti reformata kaj novenaskitajoj estas nevenkeblaj.

Ekspozicio defianta la burĝan pedagogian penson

La ekspoziciejo ne estis tre granda, ampleksante nur kvar klasĉambrojn. Sed tie oni povis vidi la lukton por venkigi proletajn kaj likvidi burĝajn pensojn, okazantan nun sur la tereno de eduko tra la tuta lando. La burĝaj pedagogiistoj asertis, ke edukado ne povas respondi al la bezonoj de la konstruado de la lando, ne povas multe, rapide, bone, kaj ekonomie efektivigi antaŭensalton. En ilia teorio troviĝas la tiel nomata "principo de laŭkapablo" ke, se oni postulas atingi multe, rapide, bone kaj ekonomie en edukado, tio estas "kontraŭ la volo de la naturo (aŭ Dio)." Ili ankaŭ emfazas la specialecon de edukado, dirante ke la malnova lernoprogramo starigita de la burĝaro estas neniam ŝanĝebla, nek tuŝebla, malgraŭ ke ĝi ege disiĝas de la nivelo de la disvolviĝintaj modernaj sciencoj kaj de la bezonoj de la produktado kaj konstruado de nia lando. Per inspirantaj faktoj la malgrandskala ekspozicio prezentis akrajn kritikojn kontraŭ tiuj burĝaj pensoj kaj burĝaj pedagogiaj teorioj. Laŭ la nuna eduka sistemo la tempo bezonata por la elementa kaj meza lernejoj estas kune dekdu jaroj, kun 10,620 lernohoroj entute. Sed ekde marto ĉijara, Gingŝan-lernejo en Pekino kaj la Eksperimenta Lernejo de la Pekina Pedagogia Universitato entreprenis provojn laŭ la reforma projekto de edukado de la naŭ-jara integra sistemo elmetita de la Pekina Pedagogia Universitato, laŭ kiu oni povos atingi la nivelon de la unua jaro de la nuna universitato nur per 8,678 lernohoroj. Tiu ĉi fakto elokvente montras al ĉiuj ke ne nur la eduka laboro povas esti plenumita multe, rapide, bone kaj ekonomie, sed la reformo en eduka laboro skribos gloran paĝon en la historio de edukado en nia lando.

Gelernantoj de la unua-jara klaso de Gingŝan-lernejo en lernado de fremdlingvo. *Foto de Gu Dehua*

La revolucio en matematika instrtado

En la reforma projekto de la naŭ-jara integra sistemo, ĉefas la radikala reformo de matematika instruado, laŭ kiu oni ne nur instruas al la lernantoj dum naŭ jaroj ĉiom da utilaj matematikaj konoj, kiujn ili lernas laŭ la malnova sistemo en la daŭro de dekdu jaroj, sed, por kontentigi la bezonojn de la disvolviĝo de scienco kaj tekniko, oni ankaŭ instruas al ili la enhavon de altgrada matematiko: analitikon, kalkuluson, teorion de probableco, matematikan statistikon kaj desegnadon, multe plialtigante la kapablon de la lernantoj en la aplikado de la matematikaj konoj por solvi praktikajn problemojn. Pro kio la nova projekto povas sukcesi en tio? Tio estas ebla, ĉar la nova projekto utiligas, laŭ vidpunkto de dialektika materialismo, la atingojn de la moderna matematiko, sentime disrompas la karakterizatan per malmoderniĝo, izoliteco, dispartigiteco, ripetado kaj skolastikemo, malnovan sistemon de matematika instruado, precipe la aksioman sistemon de eŭklida geometrio,

kaj starigas novan sciencan sistemon de matematika instruado, en kiu oni kombinas la nombrojn kun la figuroj kaj unuigas nocion kun kalkulado, ĉirkaŭ la akso de la funkcio.

Ĉu la nova sistemo estas akceptebla por la lernantoj? Jen:

La infanoj en la unuajara eksperimenta klaso de Gingŝan-lernejo, kiuj eniriis la lernejon pasintjare kiam ili havis la aĝon de ses jaroj, estas solvantaj ekvacion de algebro. El la kvardek kvin personoj, tridek ok jam regas tiajn kalkul-metodojn, kiaj $X + 8 = 12$, $X = 12 - 8 = 4$. La geknaboj en la duajara eksperimenta klaso estas desegnantaj triangulojn. Ili jam komencis lerni elementajn sciojn geometriajn. La gelernantoj en la triajara klaso jam posedas la unuapaŝan nocion pri la funkcio. Rigardu kiel klare kaj korekte ili solvis la problemojn sur la ekzercokajeroj kaj ekzamenpaperoj! Tiuj en la kvinajara klaso jam kapablas solvi aplikajn problemojn per algebraj ekvacioj. Ili plenumas tion kaj rapide kaj korekte. Ankaŭ la gelernantoj en la duajara klaso de la supera mezlernejo en la Eksperimenta Lernejo de la Pekina Pedagogia Universitato povas tute same lerni altgradan matematikon. Nun 95% de la tuta klaso povas memstare solvi la problemojn de analitiko. Dank' al la nova instrumaterialo kaj nova instrumetodo dum la eksperimentado, la intereso kaj aktiveco de la gelernantoj al lernado estas vekitaj. Posedante tiujn sciojn, ili aplikas ilin en sia ĉiutaga vivo. Utiligante la teorion de similaj figuroj, ili ĉiam mezuras la altecon de arboj, domoj aŭ elektraj lampoj. Iu lernanto dubante la korektecon de tia mezurado, grimpis sur arbon por kontroli sian mezuradon. Kiam li trovis ke la rezultoj de la surtera kaj surarba mezuradoj estis samaj, kiel ĝoja li fariĝis, ke li jam akiris tian simplan metodon por mezuri altecon. Tiuj ĉi atingoj estas nur unuapaŝaj, sed ili tiris grandan atenton de ĉiuj rigardantoj.

Gelernantoj de la unua-jara klaso de Gingŝan-lernejo en operaciado *Foto de Vu Ĝiĉang*

Rapida posedo de lingvo

En la fako de instruado de lingvo, ni same vidis bankroton de la "principo de laŭkapablo" insistata de la burĝa pedagogio. En la instruado de nacia lingvo, la infanoj unue lernas la novan fonetikan alfabeton por la han-a lingvo. Post tio, kun la fonetika alfabeto kiel helpilo, ili grandnombre lernas ideografiajojn por trarompi la barajon de ideografiaj-lernado dum unu ĝis du jaroj, ke ili kapablu per si mem legi librojn por geknaboj kaj skribi mallongajn verkajojn. Ne nur la ideografiaj-lernado estas kombinita kun la legado kaj verkado, sed ankaŭ la enklasa lernado kun la eksterklasa ekzercado, kaj la verkado kun produkta laboro kaj socia praktikado. Sekve la infanoj povas pli rapide posedi kaj manipuli la belan lingvon de la patrio kaj samtempe ricevi ideologian edukadon komunisman en la lingvolernado. Alpreninte la novan metodon de instruado de nacia lingvo en la eksperimentaj klasoj, la instruistoj de Gingŝan-lernejo kaj la Eksperimenta Lernejo de la Pekina Pedagogia Universitato sukcesis disvolvi la aktivecon de la infanoj, ke ili dum pli ol du monatoj jam ellernis grandan kvanton da ideografiajoj kaj kelkiuj el ili eĉ povas skribi sufiĉe senerarajn artikoletojn kaj poemetojn. En la antikveco estis tia anekdoto ke genia infano en la aĝo de sep jaroj povis verki poemojn. Sed kio estas mirinda en tiaj atingoj por la hodiaŭaj infanoj en la epoko de Maŭ Zedong? Ĉu tiom da bonegaj artikoletoj kaj vivecaj poemetoj kun sincera emocio elmontrata en la ekspozicio ne esats elstaraj verkoj de geknaboj ses-sep-jara? Tiuj infanoj, tre simile al delikataj plantidoj, jam povas bone apliki la skriban lingvon por ĉiutage akceli sian progresadon, tuj post kiam ili ekposedas ĝin. La duajaraj klasanoj de Gingŝan-lernejo publikigas murgazeton nomatan "Flagrantaj torĉoj". En ĝi oni trovas artikoletojn tre nete skribitajn per krajono. Iu laŭdas ies bonan konduton, alia donas garantion esti bona infano, dum la tria esprimas sian decidemon por forigi siajn difektojn. . . .

Multaj vizitantoj de la ekspozicio foje kaj refoje aŭskultis sonbendojn de fremdlingva lernado de infanoj. La gelernantoj de Gingŝan-lernejo komencas de la unuajara klaso lerni fremdajn lingvojn: iu sekcio lernas la rusan lingvon, alia la anglan, tria la germanan kaj ankoraŭ iuj sekcioj la francan aŭ hispanan. Instrui fremdajn lingvojn al tiaaĝaj in-



fanoj estas ja aŭdaca eksperimento. Sed kelkaj infanoj jam ellernis 70-80 vortojn kaj mallongajn frazojn en la daŭro de 20 lernohoroj. La sonregistrilo aŭdigas rusajn kantojn kaj anglajn poemetojn kantatajn kaj deklamatajn de la infanoj, simplan germanlingvan konversacion inter la etuloj, kaj la demandojn kaj respondojn inter la instruisto kaj la geknaboj faratajn en la leciono de la franca lingvo. Kun kia motivo oni ankoraŭ ne kredas ke tiuj infanoj povos bone posedi iun fremdan lingvon post naŭ jaroj!

Laboro kiel la unua bezono en la vivo

Kombini edukadon kun produkta laboro estas direkto komunisma por kulturi la novan generacion. Depost la eduka reformo en la Gingŝan-lernejo kaj la Eksperimenta Lernejo de la Pekina Pedagogia Universitato, partopreno en fizika laboro jam komencis fariĝi sistemo por la gelernantoj kaj la kvanto pliiĝis je 5%—15% ol antaŭe. En la ekspozicio oni povis vidi jenajn okulfrapajn sloganojn: "Laboru ĉiutage, laboru de infanaĝe!" "En laboro ekzistas nenia diferenco de rango!" "Fizika laboro plej valora!" "Aktive partoprenu en teknika renovigo kaj teknika revolucio!" Rigardu! Kiel serioze la infanoj de la eksperimenta klaso estas purigantaj la fenestro-vitrojn kaj viŝantaj la skribotablojn kaj seĝojn! Kian intereson ili trovas en la akvumado de legomoj! Laboro estas la bazo de nia edukado. La bildoj montritaj en la ekspozicio vive pruvis ke laboro saĝigas, sanigas kaj plialtigas la politikan konscion. Eduki la infanojn de ilia infanaĝo kutimiĝi al laboro kaj preni fizikan laboron kiel la unuan bezonon en la vivo, eduki ilin kiel novajn homojn ĉiuflanke disvolviĝintajn en bona kombino de la fizika kaj cerba laboroj, por ke sub nia eduka sistemo tiuĉi generacio de infanoj bone kombinu en si la fizikan laboron kun la cerba — ĉu tio ne estas aktiva preparo de kondiĉoj por la estonta transiro al komunismo? Karl Marks diris: "Tia edukado igas ĉiun infanon atingintan difinitan aĝon kombini produktan laboron kun la intelekta, fizika kaj morala edukadoj. Tio ne nur estas rimedo por pliigi la socian produktadon, sed ankaŭ la ununura rimedo por kulturi la ĉiuflanke disvolviĝintan homaron." Tiu ĉi idealo estas nun fariĝanta brila realajo.

Eduka reformo sub la gvidado de la partio

Eduka reformo estas profunda revolucio, kiu estas ne bone efektivigebla sen gvidado de la Partio. La lasta parto de la ekspozicio montris al ni kiel la lernejoj efektivigis ĝin sub la gvidado de la Partio.

Dum la procedo de la reformado, la partiaj organizoj de tiuj ĉi lernejoj persiste sin apogas sur tiuj instruistoj, kiuj subtenas la reformon en eduka laboro kaj penas kunligi al si tiujn, kiuj plejparte subtenas la reformon sed ankoraŭ sentas ioman dubon pri ĝi, forigante ilian dubon, helpante ilin solvi pensproblemojn kaj plialtigi politikan konscion. La Partio ankaŭ uzas tiajn rimedojn kiaj kolektiva preparado por instruado, reciproka aŭskultado de praktika instruado, liberhora lernado k.t.p., por levi ilian profesian nivelon kaj supervenki malfacilojn en instruado tiamaniere ke ili forigu ĉian dubon, sin liberigu de pens-nodoj kaj gaje partoprenu en la movado de eduka reformo. Nuntempe la plejparto de la instruistoj decidas plenumi sub la gvidado de la Partio la jenajn: konvenan mallongigon de la lernojaroj, konvenan plialtigon de la nivelo de la lernajoj, konvenan limigon de la lernohoroj kaj konvenan pliigon de laboro. Spertoriĉaj instruistoj kunlaboras kun spertomankaj dum la instruistoj kun novaj spertoj kunlaboras kun tiuj kun malnovaj spertoj. Sub la gvidado de la Partio la instruistoj aktive efektivigas edukan reformon kun plena manifestiĝo de kunlaborema spirito komunisma.

Ĉiuj personoj elirantaj el la ekspozicio havas komunan senton, ke ĝi estas ekspozicio kun tre klara direkto. La lernejoj marŝas sur la ĝusta vojo. Kvankam la eksperimento de la eduka reformo komenciĝis nur antaŭ nelonge, la akiritaj spertoj estas ankoraŭ ne sufiĉe maturaj kaj krome, ankoraŭ aperos novaj problemoj kaj malfaciloj, tamen, kiu novajo en la mondo estas komplete senmanka ekde ĝia naskiĝo? Plej grave estas ke ili kuraĝas entrepreni revolucion. Tio ĉi estas tre valora spirito. Kore ni antaŭgratulas, ke tiu ĉi revolucia ĝermo, sub la akvumado de la penso de Maŭ Zedong, bone kreskos, floros kaj alportos fruktojn!

Verkis Jen Gi

La Hjuan:

Printempo en Lhasa

Terkulturistoj de Lhasa marŝantaj al laboro.
Foto de Ĉen Zonglie

LA printempo en Lhasa de Ĉinio estas bela. Malgraŭ ke la neĝo ankoraŭ kovras la montojn ĉirkaŭe, en la rivervalo la sveltfoliaj, longbranĉaj salikoj kaj la altaj poploj jam verdas. La ondeta verda akvo de la rivero silente fluas tra la valo kaj en la nigrajn kampojn, kiuj estas plugitaj nur antaŭ nelonge.

La servutuloj, kruele subpremitaj kaj ekspluatitaj de generacio al generacio, decidis en la unua jaro de sia liberiĝo disvastigi patriotan movadon de pliproduktado, por rikolti riĉan frukton de laboro el sia propra tero.

La liberiĝintaj servutuloj fervore deziras sekvi la gajan kaj feliĉan vojon de socialismo sin organizante por disvolviĝo de produktado. Nun, jam ĉie establiĝis interhelpaj laborgrupoj, kaj ĉiuj laboruloj engrupiĝis. Nur kelkajn monatojn post la fondiĝo, tiuj interhelpaj laborgrupoj jam elmontris sian supe-

Lhasaanoj fosas irigacian kanaleton por plibonigi pli ol 50,000 muojn da tero en la orienta antaŭurbo.
Foto de Ging Giadong

Lhasaanoj kolektas sterkon por abunda rikolto.
Foto de Ma Pengyan

Terkulturistoj de Lhasa preparas laŭ indiĝena metodo drogojn por bone kreskigi siajn grenplantajojn.

Foto de Lin Jing

recon. Ĉiuj kampoj estis plugitaj du- ĝis kvin-foje; por ĉiu muo da tero oni uzis ĉirkaŭ 3,000 kilogramojn da sterko. Tio estis neimagebla en la pasinteco. Eĉ por la servutul-posedanto mem kaj iliaj agentoj, tio estis neebla. Dum la arda movado pri kolektado de sterkoj, la membroj de la interhelpaj laborgrupoj aktive elfosis marĉon, kolektis birdfekajon, preparis herbosterkon, kaj organizis hom kaj best-forton por transporti sterkon el paŝtaj distriktoj. En iuj lokoj oni eĉ provfabrikis ostpulvoron kaj indiĝenan kemian sterkon.

Ankaŭ la grandskala konstruado de akvoutiligo komenciĝis post la disvastiĝo de la interhelpa movado. Antaŭ semado, oni riparis ĉiujn kanaletojn kaj konstruis novajn kanaletojn, digojn kaj akvorezervejojn. Sole en Njemo-gubernio de la urbo Lhasa, 116 kanaloj kaj kanaletoj havantaj totalan longecon de pli ol 708 kilometroj, estis riparitaj kaj aliaj naŭ kanaloj estas nove konstruitaj en printempo ĉijare. La tero en la tuta gubernio estas jam plejparte irigaciebla. La liberiĝintaj tibetaj kamparanoj efektivigis la konstruadon en nur pli ol unu monato sub malfavora kondiĉo de nesufiĉo de iloj kaj maetrialo.

Sekve de la disvolviĝo de produktmovado, la movado pri reformo de agrikulturaj instrumentoj ankaŭ disvastiĝis en la vastaj vilaĝoj. Establiĝis en ĉiu gubernio, distrikto kaj subdistrikto, malgrandaj riparejoj kaj fabrikoj de agrikulturiloj, en kiuj laboras ĉiuj vilaĝaj forĝistoj, ĉarpentistoj kaj ŝtonajistoj. Ili ne nur reformis agrikulturilojn de malnovaj tipoj, sed ankaŭ fabrikis multajn novajn. Krome, azenoj, muloj kaj bovoj, kiuj neniam antaŭe tiris plugilojn, estas dresitaj por plugado ĉie en Tibeto.

Laŭ la malnova kutimo virinoj ne povis plugi, kaj iuj viroj ne povsciis plugi. Rompinte tiun ĉi malnovan kutimon, nun la virinoj kun buntaj kaptukoj kaj indienaj jupoj laboras ĉe la plugiloj ĉie en la kampoj. Oni ofte aŭdis la admirajn vortojn de spertaj maljunaj kamparanoj: "Nun la virinoj estas vere kapablaj; ili plugas tiel profunde kaj rekte, ke la viroj plej lertaj en plugado ruĝiĝis de honto."

Dum la printempa plugado, disvastiĝis ankaŭ la nova metodo de terkulturado. La malnova metodo de kruda plugado iompostiome ŝanĝiĝas. La ĝenerala aplikado de linia semado substituis la malnovan kutimon de dissemado sur la tuta terspaco. Por la plantajoj kiaj terpomo, fabo ktp., disa semado ankaŭ



Ankaŭ tibetaninoj en Lhasa, kiuj ellernis plugadon antaŭ nelonge, partoprenas en la laboro.

Foto de Ma Pengvan

ŝanĝiĝis al kava semado, kaj oni jam ĝenerale faris plantpecojn. Post la aplikado de linia kaj kava semado, la kamparanoj ĝoje diris: "La Partio kaj la Registaro ĉiuflanke nin prizorgas ke ili proponis al ni tiel bonajn metodojn, per kiuj ni certe multe pliigos la produkton ĉijare."



Terkulturistoj en la okcidenta antaŭurbo de Lhasa irigacias siajn kampojn.

Foto de Ĉen Gjun

Saŭ Jongseng ***(kamparano)*:**

La Nomo de la Nepeto

KIAM onklino Ŝi informiĝis ke Hiukin, ŝia bofilino registris sin por labori sur la konstruejo, ŝi estis tiel konsternita, ke dum la tuta posttagmezo ŝi portante la 18-monatan nepeton en la brakoj, jen eksidis, jen ekstaris sen momenta kvieto. Ĉu ŝi ne volis la foriron de Hiukin al la konstruejo, aŭ ĉu ŝi domaĝis la bofilinon pro la peza laboro? Tute ne, la problemo koncernis sole la etan nepon. Dum sia junaĝo onklino Ŝi jam sesfoje naskis infanojn, kiuj ĉiuj trofrue mortis aŭ pro malsano aŭ pro manko de lakto, krom nur la plej juna Ĉunĉeng kiu finfine restas vivanta, por kontinuigi la familian linion. Sed ne tiom kiom al ŝi prosperis eĉ al la bofilino; jam preskaŭ tridek-jara, tiu ankoraŭ ne foje gravediĝis. Kvankam ne estas moro nun kredi je superstiĉajoj, onklino Ŝi tamen kaŝe iris al aŭguristoj kaj konsultis la dion, sed infano ĝise ne naskiĝis al la bofilino. En ĉiuj aliaj rilatoj onklino Ŝi estis tute kontenta pri sia bofilino; kiu fariĝinte brigadestrino de produktado, malofte hejmrestis, sed kiam ajn ŝi revenis, ŝi ĉiam intime traktis sian bopatrinon kore zorgante pri ŝia farto per supersuto de demandoj kaj alparoloj, vere eĉ pli bone ol iu propra filino. Nur pro ŝia sterileco onklino Ŝi havis kaŭzon por plendi, kaj ekgrumblis malantaŭ la bofilino. Precipe al avino Huang, kiu ĉiam havis por ŝi kunsenton kaj samopinion, ŝi konfidis sian ĉagrenon. Post du aŭ tri frazoj, onklino Ŝi jam kondukis la konversacion al la temo pri sia bofilino:

"Kion vi diros je tio? Se vi bredas kokinon, ŝi almenaŭ metas al vi ovojn, sed tiu bofilino mia. . . . . aj!"

"Vere, ja!" tuj akordis avino Huang. "Oni prenas bofilinon por naski infanojn. Kiel estas evitebla alies grumblado, se mankas naskpovo de idoj?" Avino Huang plene samopiniis kun onklino Ŝi, ne trompante la konfidemon de la lasta.

Sed, en septembro lastjare, Hiukin fine naskis por onklino Ŝi dikan nepeton. Kiam la akuŝistino eliris kun rideto el la ĉambro de Hiukin, kaj alparolis la pro atendado maltrankviliĝintan avinon, "Regalu min per festdrinko, avnjo! Estas dika fileto." Kun ridantaj okuloj la maljunulino rondiris en la korto por kelkaj fojoj, ne sciante kion ŝi devas unue fari. Finfine ŝi pensis, ke ruĝa tuko estu pendigita sur la dompordo kiel averto, por ke malatentemuloj ne entrudiĝu kun malbona vento en la domon.

Por dece nomi sian nepeton onklino Ŝi cerbumis tutan duon-nokton. Unue, ŝi volis nomi lin Fuguj[1], sed ekmemorante ke ŝia propra frato nomiĝis Daguj[2], ŝi trovis ĝin neuzebla. Ĉu konvenas Ginbaŭ[3], Facaj[4]. . . . .? Ŝi ne povis decidi. Post duonnokta pripensado, ŝi finfine trovis plej konvena la nomon Cangming[5]. Apenaŭ tagiĝis, onklino Ŝi komunikis sian ideon al la bofilino. Hiukin ridis, "Ĝuste tian feŭdisman nomon mi ne ŝatus. Pri lia nomo mi jam delonge pensadis, nomu lin plej dece Juegin[6]."

Onklino Ŝi ekkoleris ĉe tio kaj kontraŭdiris urĝe, "Juegin, Juegin, tio signifas laboradon, kiel oni povus alpreni ĝin por nomi infanon?"

"Panjo, Juegin estas belsona kaj signifoplena. Konsentu nomi lin Juegin, ĉu?" Hiukin diris favoronpete. Verdire, onklino Ŝi tion malkonsentis el la fundo de sia koro, sed ŝi trovis ne dece tro obstini, ja fine estas ŝia bofilino kiu naskis la infanon. Ŝi nur murmuris: "Kia ideo? Ne sufiĉas antaŭensaltadi mem tage kaj nokte sur la deklivo, ke aldone eĉ la infano tion portu en sia nomo. Ĉiel ajn, per tiu nomo mi ne lin nomos."

Tiun posttagmezon, onklino Ŝi denove vizitis avinon Huang. Enirinte la domon, ŝi tuj komencis sian plendon. "Divenu, kian fantazian nomon elektis por la infano mia kaprica bofilino. Juegin — antaŭensalto. Tio signifas laboradon. Ne volante ke la infano ĝuu feliĉon, ŝajne ŝi preferas ke li laboradu, kia absurdo! Laŭ mi, nomoj kiaj Fuguj, Facaj, Ĉangming . . . ĉiuj estas agrablaj al la orelo kaj facile eldireblaj por la lango, sed tiu bofilino mia. . . aj, nedireble." Ju pli ŝi daŭrigis la parolon, des pli kolera ŝi fariĝis. Avino Huang ne sciis kion diri, ĉu jesi aŭ nei. Post longa meditado, ŝi fine malfermis sian buŝon. "Estas vere, tiom multas bonaj nomoj, kiujn ŝi ne preferas ĝuste ol Juegin. Rigardu al mia nemortema maljunulo. Li nomis sin Sujĝou[7], kaj efektive sekvis sian patron al la Nordoriento. Nur dank' al prezidanto Maŭ ke li ne postlasis sian ostaron ekster Ŝanhajguan[8] samkiel lia patro." Pli kaj pli maltrankviliĝis onklino Ŝi dum la aŭskultado. Ĉar la filo laboras en la ŝtal-fabriko, kun neniu ŝi povas nun konsiliĝi en la hejmo. Je tiu ĉi momemto de brula embaraso, ŝi subite ekmemoris ke estas jam tempo por kuiri ovojn por la bofilino, kaj tuj sin returnis hejmen.

Kvankam onklino Ŝi malaprobis la nomon Juegin, tamen ŝi ne povis trudi al la nepo la nomon Ĉangming kiun malakceptis la bofilino. Ŝi do daŭre nomis lin karuleto, trezoreto, koreto . . . ktp. Kiam la nepeto estis nur unu-monata, ŝi jam volis preni lin en siaj brakoj. Dum li dormis, ŝi gardis ĉe la dompordo por ke pasantaj ĉaristoj ne tro laŭte pelkriu la jungatajn brutojn kaj fortimigu la animon de la infaneto. Unuvorte, metinte sur la manplato, ŝi timas pri forflugo; entenante en la buŝo, ŝi timas pri degelo, tiomgrade ŝi dorlotis la nepeton.

Tiel pasis unu jaro en palpebruma daŭro. Neniu foje aŭdis ke Ŝi nomis sian nepon Juegin. El tio ĉi, evidentiĝis, ke vere granda estas ja ŝia decidemo.

Baldaŭ estos la tempo de Prujnofalo[9]. Kaj jen la bofilino anoncis sin por iri al la konstruejo. Estis dirite, ke ĉe la konstruejo oni tranoktas en tendoj sur la montdeklivo. Kiel povos tion toleri ŝia nepeto? Tutan nokton onklino Ŝi sin turmentis per la penso, eĉ minuton ne ferminte siajn okulojn. Ĵus je tagiĝo ŝi tuj iris al avino Huang, kiu konsilis ŝin mem ankaŭ iri kun la nepo al la konstruejo, promesante al ŝi prizorgadon pri ŝiaj tri ovonmetantaj kokinoj kaj bona konservado de ĉiuj ricevotaj ovoj. Kiam Hiukin eksciis la planon, ŝi diris al la bopatrino ridetante: "Panjo, mi jam trovis vartanton por la infano. Estas onklino Liu loĝanta en la domo sub la granda soforo, ŝi estas homo kun tre milda karaktero. Vi jam estas tiel maljuna, kiel vi povos iri tien? Cetere, neniu restos hejme, se vi iros." Tamen, onklino Ŝi admonis tute serioze, "Kiom stulta vi estas! kvankam onklino Liu havas mildan karakteron, nia infano fine ja ne estas ŝia propra sango kaj karno, kiel mi povus restis hejme trankvile." Vidinte la seriozecon de sia bopatrino, Hiukin konsentis iri kun ŝi al la konstruejo. "Estos ankaŭ bone ke ŝi iom vastigu sian vidkampon," ŝi pensis.

Estis la unua fojo por onklino Ŝi fari tiom longan vojaĝon. Antaŭ tagiĝo ili ekveturis en ĉarumo puŝata de Hiaŭcang, junulo de la sama vilaĝo. Ili atingis la cellokon nur post la noktomezo. Sur la konstruejo brile lumigas torĉoj kaj lanternoj, svarmis homoj kaj henas ĉevaloj, eĉ pli brue ol en templa foiro en la pasinteco. Onklino Ŝi sekvis sian bofilinon, jen orienten jen okcidenten, kaj nur post sennombraj turniĝoj finfine venis al la dormejo. Pro la tuttaga vojaĝo sur la skuema veturilo, ekde frua mateno ĝis profunda nokto, onklino Ŝi jam tiel laciĝis, ke ŝi tuj endormiĝis kiam ŝi ekkuŝis, ne trovinte tempon eĉ por preni manĝon. Post kelktaga loĝado ĉe la konstruejo, sen konatuloj en fremda loko, onklino Ŝi eksentis enuon. Eble la bopatrino sopiras al la hejmo aŭ eble ŝi zorgemas pri la kokinoj en la hejmo, pensis en si Hiukin: Foje, kiam la buntkola kokino metis unu ovon aliloke, ŝi grumbladis tutajn kvin, ses tagojn, ĝis kiam la ovo estis fine trovita inter la fojnoj en la draŝejo. Sed pro la nepeto la bopatrino elportis longan vojaĝon de 70-80 li-oj forlasinte la hejmon kaj ĉiutagan okupon. Tial, Hiukin ankaŭ tre zorgemis kiam ŝi trovis la maljunulinon en malbona humoro. Ŝi do kondukis ŝin al la konstruejo por iom distriĝi, rigardi tieajn vidajojn kaj la Flavan Riveron. Tiu lasta ja ne estis fremda por Ŝi. En la jaro de ŝia edziniĝo, je la dekkvina de la sepa monato laŭ la luna kalendaro, la Flava Rivero inundis la ĉirkaŭajn vilaĝojn kaj ruinigis multajn familiojn. Tio preskaŭ pelis la vilaĝanojn rifuĝe al la Nordoriento. Post tio, kiam oni menciis pri la Flava Rivero, onklino Ŝi ĉiam ankoraŭ paliĝis pro teruriĝo, ĝis post la Liberiĝo en 1949, kiam ŝi sciiĝis, ke la Komunista Partio havas rimedon por utiligi kaj jungi la akvon. Kaj hodiaŭ ŝi eĉ povas propraokule rigardi la Flavan Riveron. Tio ŝin multe kortuŝis.

Dum la irado, subite aŭdiĝis krio inter la homamaso, "*Juegin*, junuloj! Vidu, jen venas eĉ onklino Ŝi por nin helpi." Onklino Ŝi haltis, kaj okule serĉadis vane inter la homamaso por longa momento, ĝis ŝi fine trovis ke la parolinto estas Hiaŭcang, kiu en blanka ĉemizo, energie fosas la teron, kaj ŝvitvaporo estas super lia kapo. Hiaŭcang konis la sekreton de onklino Ŝi. Kiam li renkontis ŝian nepeton, li intence nomadis lin Juegin. Tial, en la hejmvilaĝo, onklino Ŝi ĉiam koleretis ĉe montriĝo de Hiaŭcang. Sed, nun, neniu scias kial, ŝi sentis ĝojon en la koro vidante lin. Ŝi alproksimiĝis al Hiaŭcang kaj demandis kun mieno mistera, "Ĉu vere vi fosas por alkonduki la Flavan Riveron?" Tion al ŝi diris jam Hiaŭcang survoje al la konstruejo. "Kiu ja mensogas en tio!" "Ah! Vi, jusnaskitaj bovidoj, ne timas la tigron, sed tio ne estas ŝercaĵo." "Estas *juegin*, onklino," klarigas Hiaŭcang. "Ĉu vi ne vidis, kiel oni akvumas la karotojn? Oni enlasas la akvofluon kaj haltigas ĝin, tiel per la ŝovelilo, jen malfermante, jen fermante la fluejon. Ĝuste same facile, ni utiligos la akvon de la Flava Rivero por akvumado." Lia parolo kun gestado laŭte ridigis la ĉirkaŭstarantojn. Onklino Ŝi ne havis tempon por daŭrigi la babiladon kun li. Ŝi rapidis post sia bofilino al la ĉefdigo. La flava akvego ruliĝadids en ondegoj, same kiel ŝi vidis en la jaro de sia edziniĝo. Ĉe la unua ekvido, onklino Ŝi sentis kapturniĝon kaj la kruroj apenaŭ povis ŝin subteni. Post momento ŝi, tamen, regajnis la forton, pensante en si: "Kial timi? Nun ĝi estas kvazaŭ tigro fermita en kaĝo, kiu jam povas neniun minaci, kiel ajn sovaĝa ĝi estu." Tamen, onklino Ŝi ne povis kredi tion, kion ŝi aŭdis de Hiaŭcang, ke oni alkondukos la Flavan Riveron por akvumi la teron. Laŭ ŝi, la komunistoj ne faros tian senbazan aferon. Sed, finfine, ŝi ne povis esti trankvila pri la demando. Do, marŝante ŝi demandis al Hiukin, ĉu tio estas vera. Montrante al la monte amasigitaj ŝtonegoj kaj al la muĝantaj maŝinoj, Hinkin diris: "Jen, ĉio estas preta, la maŝinoj jam venis. Morgaŭ oni inaŭguros la konstruadon. Nun estas la tempo de *juegin*. Ĉio dirita estos tuj farata. Ni ne plu timos, eĉ se por dek jaroj ne pluvos. Ĉiel ajn ni havos abundan rikolton. Eble ĉijare la tritikoj gustumos la akvon de la Flava Rivero." Onklino Ŝi jesis, duonkrede. Subite, ŝi memoris pri la starigo de palisoj kaj flagetoj antaŭ kelkaj monatoj en la orienta parto de la vilaĝo. Iu kadro el la gubernio diris ke oni irigacios per la akvo de la Flava Rivero, ke la loko fariĝos same riĉa kiel la sudo de Jangzi-rivero: Ĉie kreskos la arboj de piroj kaj pomoj en ĝardenoj . . . . Nun onklino Ŝi konstatis ke alkonduko de la Flava Rivero estas afero vere farata.

Tiun nokton, onklino Ŝi ne povis endormiĝi sin turnante tien kaj reen en la lito. Ŝi aŭdis kantadon el la megafono kaj la kriojn de la konstruantoj. En ĉio sonas la vorto *juegin*. *Juegin*, *juegin*, ĉie estas *juegin*. "Nur se estas *juegin*, ni same akiros riĉan rikolton, eĉ se regus senpluveco por dek jaroj." La vortoj de Hiukin elvokis amaran pasintajon en la memoro de onklino Ŝi. Tiam, kiam Ĉunĉeng aĝis ankoraŭ malpli ol unu jaro, por du jaroj sinsekve ne falis eĉ guto da pluvo, la timema patro de Ĉunĉeng, ne povante pagi la terrenton, sin pendigis hejme, post reveno de du-vespera persekutado fare de bienulo Liu Laŭsan. Kiel sin vivtenis la postlasitaj vidvino kaj orfo . . . . Ŝi eĉ ne kuraĝis rememori.

"Jes, ĉio estus alie nun. Eĉ se por dek jaroj ne pluvos. . . ." La kanto pri *juegin* interrompis la meditadon de onklino Ŝi. En ŝia kapo nun la signifo de *juegin* rapide ŝanĝiĝis: Ĝi ne sole signifas laboradon; ĝi rapidigas la alvenon de feliĉigo de la vivo! Jen, en la imago de onklino Ŝi aperis bela bildo: Tuj ĉe ŝia vilaĝo fluas klara akvo; sur la ambaŭ bordoj prospere kreskas vitoj, pomarboj, pirarboj. . . .

Post la matenmanĝo, kune kun onklino Liu onklino Ŝi promenadis prenante la nepon al la najbareco de la konstruejo. Iu aspekte tre konata kadro alproksimiĝis, transprenis kaj karesis la infanon, demandante, "Kiel nomiĝas la karuleto, onklino?"

"Ah! li nomiĝas. . . ."

"Juegin," intermetis sin onklino Liu.

"Ah! jes, li estas nomata Juegin."

"Bone, eta Juegin! Kiel bela li estas ĝuste kiel la bela nomo!" Laŭdante, li foriris. Onklino Ŝi ekmemoris ke tiu estas la sama kadro kiu iam faris paroladon ĉe la orienta parto de la vilaĝo.

Onklino Ŝi kaŝe pririgardis por momento sian nepon en la brakoj. "Kiel bela eta Juegin! Same kiel la bela nomo," ŝi senĉese ripetis. Efektive, agrable sonas la nomo Juegin, — ektrovis onklino Ŝi. Kaj kiel vulgaraj, estas la nomoj Ĉangming, Fuguj. . . . Ŝi ekhontis pro ili kaj eĉ ektimis remencion.

Pasis duona monato, malvarmiĝis la vetero. Hiukin timis, ke tio estos netolerebla por la maljunulino kaj persvadis ŝin reiri hejmen. Kaj onklino Ŝi ekmemoris ĉe tio siajn kokinojn: la fragmitflora, la hirtfemura, krom la buntkola, kiu lasta metas ovojn ĉiutage kun intermito post du, ili kune devas jam esti metintaj ĉirkaŭ 40 ovojn — la sumon fine trovis onklino Ŝi post longa kalkulado per la fingroj. Cetere, onklino Liu efektive atenteme prizorgis la infanon, kaj eĉ pli bone ol ŝi mem. Ŝi do kun trankvila koro hejmen veturis per la ĉaro kiu transportis nutrajon al la konstruejo.

Ĵus pašinte en la domon de avino Huang, onklino Ŝi tuj malfermis la buŝon dezirante en unu spiro elverŝi ĉion, kion ŝi aŭdis aŭ vidis, en la orelojn de avino Huang.

"La belecon de mia Juegin laŭdis eĉ tiu altranga kadro. De nun vi ankaŭ nomu mian nepeton Juegin!"

Avino Huang tre miregis, ke onklino Ŝi jam akceptis la nomon Juegin por sia nepeto, post unujara obstina malagnosko. Kiel tio povis okazi post unufoja vojaĝo? Kvazaŭ respondante al ŝia miro, onklino Ŝi daŭrigis, "Ĉi tie ni ankaŭ akvumos baldaŭ la kampojn per akvo el la Flava Rivero. Ĉu vi ne vidis kiel oni akvumas la karotojn? Jen, tiel malfermu, se vi volas akvon, kaj fermu kiam vi finakvumis. Eĉ se dek jarojn ne pluvos, nenio malhelpos nin daŭre manĝi mantoŭ-ojn[10]."

"Ĉu vere?" Avino Huang senĉese interpunkciis per mirkrioj.

"Kial mi vin trompu? Se ne estus *juegin*, kiu scius ĝis kiam oni povos alkonduki la akvon de la Flava Rivero por irigaciado. *Juegin* ne signifas nur laboradon, ĝi donos ankaŭ al ni pli feliĉan vivon. Ja multe mi lernis dum tiu ĉi vojaĝo. Estas prave nomi mian nepeton Juegin!"

"Jes, la avino de Juegin! Nun estas moro uzi novajn nomojn, kiaj Heping[11], Ajguo[12], Ĉaŭjing[13]. . . .

Tri Popolkantoj

Nova Puto

— Popolkanto el Ŝandong-provinco —

Jen nova puto — knabina okulo
akveske brilas je ekrulo.
Pro ĝia brilo, kapon klinas rizoplantoj.
pro ĝia brilo, vang-ruĝiĝas sorg-gigantoj,
pro ĝia brilo, maiz-spikoj ridas dentar-montre,
pro ĝia brilo, batat-buloj dolĉas plentubere,
pro ĝia brilo, greno amasiĝas monte,
pro ĝia brilo, niaj tagoj ekgustas miele.

La Popolkomunumo — Pontego el Oro

— Popolkanto el Henan-provinco —

Mastrumo de individuo — soltrunka ponteto,
terure ĝi ekŝanceliĝas je pied-surmeto;
labor-interhelpa grupeto—pontet' el ŝtonplatoj,
ne tiom fortika antaŭ ventblovad' kaj pluv-batoj;

Kooperativo — jam vera ferponto tre bona,
sed ne trapasebla samtempe por amas' miliona;
sole la popolkomunumo — pontego el oro
al tera Eden' kondukanta, jen ponto de gloro.

La Nordo Ĝuos la Sudlandan Belon

— Popolkanto el Ŝenhi-provinco —

Ilustris Gu Juan

Torentas niaj kantoj,
— jen nia kora ŝato.
Kantinte l' kooperiĝon,
ni psalmas pri l' impetado.
Ni kantas — ne plu submontiĝas akvo, tero:
ni kantas — en la kampoj, pliproduktoj;
ni kantas — surmonte dombestoj en prospero;
ni kantas — nia valo plenas je or-fruktoj.
*Kantante ni transsaltos Flav-riveron,**
kaj la Nordo ĝuos la Sudlandan belon.

Trad. Laŭlum

* Tio estas superi la fiksitan produktonormon de greno por la regiono de la Flava Rivero en la Programo de Agrikultura Disvolvo.

Mi opinias, ke via nepeto Juegin havas sian nomon tre belsonan."

"Kiel bela Juegin. Same kiel la bela nomo!" Jam estis profunda nokto, oni aŭdis ke onklino Ŝi ankoraŭ murmuras en sia ĉambro.

1) *Fuguj signifas: riĉa kaj altranga.*

2) *Daguj signifas: tre altranga.*

3) *Ginbaŭ signifas: alveno de trezoroj.*

4) *Facaj signifas: riĉiĝo.*

5) *Ĉangming signifas: longviva.*

6) *Juegin signifas: antaŭensalto.*

7) *Laŭsone koincidas kun esprimo: iri sekvante.*

8) *Montpasejo kondukiĝanta al Nordorienta parto de Ĉinio.*

9) *Laŭ ĉina luna kalendaro, koincidante kun la 23a aŭ 24a tago de okt. de gregoria kalendaro, ĝi estas unu el la 24 sezondisigaj tagoj de l' jaro.*

10) *Buloj el vaporumita fermentita farunajo.*

11) *Heping signifas: paco.*

12) *Ajguo signifas: patri-amo.*

13) *Ĉaŭjing signifas: superi anglion.*

Caj Ĉu-ŝeng:

Floroj de Antaŭensalto de Belartaj Filmoj

PAROLANTE pri la ĉinaj belartaj filmoj de la lastaj jaroj, oni ĉiam laŭdas kaj admiras. Tio ne estas hazarda. Sub la ĝusta gvidado kaj intima zorgado de la Partio, la belartaj filmoj de nia lando kreskas kaj disvolviĝas laŭ eksterordinara rapideco. En la ĝardeno de la belartaj filmoj solecis nur kelkaj floretoj antaŭ kelkaj jaroj, sed nun jam buntas multaj kuriozaj floroj kaj abundas belaj fruktoj. En la Ekspozicio de Belartaj Filmoj okazinta en Pekino estis ekspozataj multe da elstaraj belartaj filmoj, kiuj montras grandegan sukceson atingitan en la lastaj du jaroj depost la komenco de antaŭensaltego, kaj gajnis unuaniman laŭdon de vasta rigardantaro kaj de literaturistaj kaj artistaj rondoj.

La belartaj filmoj ekspozitaj estas sufiĉe riĉaj kaj multe koloraj tiel en la enhavo kiel en la formo. Laŭ la enhavo, inter la ekspozitaj 11 belartaj filmoj estas *Sunplena Printempo, Renovigmaniulo* kaj *Granda Rafano*, kiuj prikantas antaŭensaltegon kaj teknikan revolucion; *Kolombo* kaj *Kiu plej Bele Kantas?*, kiuj malkaŝas kaj mokas la malamikojn de la paco; kaj ankaŭ filmoj de belaj fabeloj kaj popollegendoj: *Knabin-hakisto de Brulligno, Abelo kaj Lumbriko, Simio kaj Testudo Dividas Arbon.* Laŭ la formo, ankaŭ plimultiĝis la specoj, ne nur estis filmo de animita pentraĵo, pupaj filmoj, kiujn ni bone konas, kaj la nove kreita papertranĉajaj filmoj, sed ankaŭ filmoj de ĉinstila pentrajo kaj paperfaldaĵa filmo, formoj plejlaste kreitaj.

Resume, la belartaj filmoj de nia lando havas du tre klarajn karakterizajojn: unue, intima ligiĝo kun nuntempa reala vivo, por eduki infanojn per komunisma ideo; due, strebado en la direkto de nacia stilo en formo.

Niaj laborantoj de belartaj filmoj, per senkompara zorgemo turnas sian atenton al la neordinaraj novaj aferoj kaj novaj homoj aperantaj en la tempo de antaŭensaltado de nia lando, kaj kun

EL "GRANDA RAFANO"

La konservativa spertulo de rafankulturado estas venkita en rafankultura konkuro kaj mokridata de la celebrantoj.

EL "LA KNABO FIŜKAPTANTA"

tutkora entuziasmo spegulas la grandiozan idealon kaj ĉielon tuŝantan energion de nia popolo. *Sunplena Printempo* en genro de mito spegulas la nuntempan mitsimilan realon de nia lando. La unua printempo de la sesdekaj

La papertranĉaja filmo rakontas pri ĉina maljuna fiŝkaptisto, kiu batalas kontraŭ burokratoj kaj imperiistoj lin subpremantaj kaj prirabantaj. La sceno prezentas la magian pelvon kun trezordona knabo fiŝkaptanta trovitan de la fiŝisto en la maro.

Ŝoŭgin:

La ses ĉevaloj de Ĝaŭling

LA mondfama ŝtonskulptajo, *la Ses Ĉevaloj de Ĝaŭling* estas valorega heredajo de nia sescentmiliona popolo, kaj cetere estas ankaŭ trezoro de monda arthistorio. Sed usonaj imperiistoj ilin hakdifektis kaj forrabis la du plej bonajn, Saluzi kaj Kjuanmaŭgua, al Usono. Nun tiuj du rabajoj estas retenataj en la muzeo de Philadelphia Universitato.

Ĝaŭling estas la maŭzoleo de la dua imperiestro de Tang-dinastio, Li Ŝimin (597 — 649 p.K.). Ĝi troviĝas ĉe Giuzong-monto en Kian-gubernio, Ŝenhi-provinco. Tang-dinastio estis la plej prospera periodo de la feŭdisma socio de nia lando, kaj la ŝtona skulptajo de la maŭzoleo ankaŭ bone spegulas la tempon, karakterizata per imponeco kaj forteco. La ses ĉevaloj estas ŝtonaj reliefoj en du vicoj po tri, oriente kaj okcidente, interne de Hjuanvu-pordego de la maŭzoleo. Laŭ registro farita en Song-dinastio (960 — 1276 p.K.) la ses ĉevaloj estis tiuj, kiujn Li Ŝimin rajdis, kiam li batalis por fondi la Imperion Tang. Por rememorigi la meritojn de tiuj militĉevaloj la imperiestro farigis la skulptajojn.

Laŭ *Ginŝilu* (*Notoj pri Metalajoj kaj ŝtonajoj* verkita de Ĝaŭ Mingĉeng de Song-dinastio), sur la reliefoj estis skulptitaj laŭdoj de la imperiestro mem, kies skribo estis el la mano de la elstara majstro de manskribo Oŭjang Hjun. Estas troveblaj vakantaj spacetoj sur la kapoj de la ĉevaloj, kie estas lokoj por la laŭdoj, kiuj estas nun ne plu legeblaj, korodite d evento kaj pluvo jam de pli ol mil jaroj. Tamen ilin registris ambaŭ la libroj *Ĉang'anĝi (Libro pri Ĉan'an) kaj Prozoj el Tang-dinastio,* el kiuj oni informiĝas pri la nomoj de la ĉevaloj kaj iliaj partoprenitaj bataloj.

Saluzi estas la plej bone skulptita el la ses ĉevaloj kaj ankaŭ la ununura, ĉe kiu estas homa figuro. Pri tiu ĉevalo estas skribita en *la Biografio de Kiu Hinggong* el *Tangŝu (Historia Libro de Tan-dinastio)*: Dum la batalo kontraŭ Vang Ŝiĉong ĉe Mang-monto, Luojang, Li Ŝimin provis eksondi la malamikojn kun kelkdek rajdantoj. Dum kontraŭbatalo ĉiuj eskortantoj estis disigitaj, escepte Kiu Hinggong. La persekutantaj malamikoj paftrafis la ĉevalon de Li Ŝimin per sago, sed Kiu Hinggong pafis brave ĉiuflanken, ke

La ĉevalo Saluzi



jaroj, estas printempo por grandskale entrepreni teknikan renovigon kaj teknikan revolucion, por pluan paŝon konkeri la naturon kaj por pli-grandpaŝe antaŭensalti; la filmoj per simbolaj figuroj, ĝeneralige spegulas la nubon supe-



EL "KIU PLEJ BELE KANTAS"

En iu usona urbo "bonfarantino" trovis du senhejmajn infanojn kaj ilin adoptis pro iliaj belaj voĉoj intencante gajni cent-mil-dolaran premion en kantokonkurso. Multe ŝi klopodis kaj esperis, sed la premio estas juĝita al paro da buldogoj pro ilia genia bojado.

rantan bravan volon kaj senkomparan forton de nia 650-miliona popolo, sub la gvidado de la Komunista Partio kaj Prezidanto Maŭ. *Renovig-maniulo* kaj *Granda Rafano* prikantas heroajn homojn, kiuj kuraĝas kreadi en teknika renovigo, ankaŭ humore mokas tiujn, kiuj havas egoisman kaj konservativan ideon.

Tiuj filmoj altiras la aspirojn de junaj rigardantoj al la reala vivo de arda socialisma konstruado, edukas la junan generacion al nova karaktero, nova ideologio kaj novaj virtoj de malsuperstiĉo kaj aŭdaco en pensado kaj agado. Tiuj filmoj estas kun klara idea enhavo kaj forta batalspirito. Tiu ĉi karakterizajo de niaj belartaj filmoj, devas esti firme disvolvata plue.

Estas tute necese, ke donante al la infanoj fortan pozitivan

la malamikoj ne kuraĝis alproksimiĝi. Poste, li eltiris la sagon de la ĉevalo, transdonis sian propran ĉevalon al Li Ŝimin, kaj mem paŝante trabatis vojon al sia propra pozicio sola kun longa glavo. Por honori lian meriton, Li Ŝimin speciale skulptigis la scenon de sagotirado sur ŝtono.

Sur la reliefo la klinita kapo de la ĉevalo kaj la movo de la homo esprimas ian intiman senton. Tre reale estas prezentitaj ankaŭ la vestoj kaj ornamajoj de la homo kaj ĉevalo. La kiraso kaj batalvesto, sabro kaj sagujo de la homo estas laŭ la kutima maniero de Tang-aj militistoj. La kolharoj de la ĉevalo estas aranĝitaj laŭ la tiama modo, en t. n. "tri floroj".

El la aliaj kvin reliefoj, du montris ĉevalojn en paŝado kaj tri en galopado. Ĉiuj estas fortikaj kaj fortplenaj. Ĉe la galopantaj ĉevaloj, la kvar hufoj saltas en la aero, streĉitaj estas la muskoloj, kaj la naztruoj plivastiĝas pro spirego—ĉio estas tre esprimplena.

La Ses Ĉevaloj de Ĝaŭling estas unu el la reprezentantaj artverkoj pri ĉevaloj de Han- kaj Tang-dinastioj. Ĝi spegulas la realisman artan tradicion de nia lando.

La filmo de vivigitaj ĉinstilaj pentrajoj instruas al la infanoj pri la vivo de rano kaj aliaj bestoj.



EL "RANIDOJ SERĈAS PANJON"



EL "KNABIN-HAKISTO DE BRULLIGNO"

Tiu ĉi pupofilmo rakontas pri knabino misirinta en la hejmon de monstra lupego, kiu ŝanĝis knabon en bovon kaj uzis kiel rajdbeston. La knabino kuraĝe luktis kontraŭ la lupego kaj fine ĝin mortigis sub la helpo de la bovo, kiu reakiris sian homformon post la venko super la monstro.

edukadon per modelo de novaj homoj kaj novaj aferoj en la socialisma konstruado, la belartaj filmoj ankaŭ liveras produktajojn malkaŝantajn kaj batantajn la malamikojn. La artistoj ne nur per la figuro de kvarkrura lupo en legendo edukas infanojn por malami malbonan potencon, sed ankaŭ uzas la figuron de "dukrura lupo" — la imperiisto en la reala vivo, kiel "negativan instruanton" por la junaj rigardantoj. La pupaj filmoj *Kolombo* kaj Kiu *plej Bele Kantas*? akre malkaŝas, kiu estas la malamiko de paco, kaj la veran staton de la "Dolara Imperio". Tiuj ĉi filmoj edukas infanojn malami la imperiistojn, malami la kriman sistemon de ekspluatado, por ke ili pli arde amu la socialisman socion kaj nian feliĉan novan vivon.

En strebado al la nacia stilo kaj populariĝo de la filmarto, tre laŭdindaj estas la diligenta studemo, kuraĝa renovigemo kaj kreemo de la laborantoj de belartaj filmoj. En la movado de teknika renovigo, laborantoj de la belartaj filmoj, sukcesis kombini la tradician ĉinan pentroarton kun la metodo de la filmoj de animita pentrajo, kaj kreis filmojn de ĉinstila pentrajo, novan formon riĉan je naciaj karakterizajoj. Kiam ni vidis ke la ranoj, kraboj, kokidoj kaj akridoj pentritaj de la fama ĉina pentristo Ki Bajŝi subite ekmoviĝas, kaj eĉ prezentas sian vivohistorion, ni ja ne povis nin deteni de admiro! La jus ekspozitaj filmoj de ĉinstila pentrajo kaj de paperfaldajo estas ankoraŭ provaj verkoj, sed ni povas atendi ke post plua studado kaj esplorado kaj senĉesa plibonigado fare de la laborantoj de la belartaj filmoj, ili nepre fariĝos novaj popularaj formoj ŝatataj de vasta rigardantaro, indiferente ĉu ili estas junaj, mezaĝaj, maljunaj.

Krome, la ekspozitaj *Abelo kaj Lumbriko* kaj aliaj filmoj kun temoj el fabelo kaj popollegendo, ankaŭ estas ŝatataj de geknaboj.

Deziras Korespondi

* **Rondeto de l' internacia amikeco** ĉe Palaco de Pioniroj, Ĥmelnickij, USSR., dez. kor. kaj interŝ. pm., pk. k semojn de floroj kun gepioniroj kaj gelernantoj el ĉl.

* **Popov. A. A.,** Kuzneckaja 101-A, kv. 5, Stalingrad 3, USSR., dez. kor. kun ĉl. k interŝ. bk.

* **Sava St. Negolov,** str. Zdvavko Ĉampoev 44, Ruse, Bulgario, dez. kor. kun ĉinaj esp-istoj.

* **Lembit Vask,** Krivoj-Rog 44, Do vostrebovanie, Ukraina SSR. USSR., dez. kor. kun Afrikaj, Aziaj kaj ĉinaj esp-istoj.

* **Sro Gaston Tremon,** Cite de Gaubre 45, BRINE (Correze), Francio.

* **V. V. Kulikov,** dez. kor. kun ĉl. pri matematiko kaj edukado, str. Sazonova 33, OMSK 7, USSR.

* **Hristo Atanasov,** ul. Milan Vasilev 49, Sviŝtov, Bulgario, dez. kor. kun ĉl. pri ĉt. k interŝ. fotojn kaj esp-aĵojn.

* **S-ro Walter Ruffinengo,** dez. kor. pri matematiko, fiziko, muziko aŭ pri ĉt.; Cochabamba 1793, Rosario, Argentino.

* **Sro Miguel Angel Ruffinengo,** dez. kor. kaj interŝ. p.k., revuojn ktp.; Cochabamba 1793, Rosario, Argentino.

* **Edgardo Mancusso,** Pje. Argentino 2729, Rosario, Argentino, dez. kor. kun gestudentoj el tutmondo.

* **Malceva Klavdija,** 26-jara instruistino, dez. kor. kun ĉl., interŝ. bk., USSR. Rostov-Don, Novij gorod, Baltijskaja 3.

* **Popova Rimma,** 24-jara instruistino, dez. kor. kun ĉl., interŝ. bk., USSR. Rostov-Don, ul. Engelsa 206, kv. 34.

* **Viktoria Rukavcova,** 25-jara mekanika inĝenierino, dez. kor. kun ĉl., interŝ. bk., USSR. Rostov-Don, Pr. K. Marksa 54/101, kv. 83.

* **Instruistino Irina Dolmatovskaja,** dez. kor. k interŝ. pm., USSR. Rostov-Don, ul. Ŝaumjana 95, kv. 2.

Guo Ĉaŭĵan:

TRIUMFO de Kolektivismo

"Ĉio por la kamaradoj,
ĉio por la kolektivo"
devizo de
Ĉina Montgrimpa Ekspedicio



Marŝo inter glacituregoj 5800 metrojn super marnivelo.

LA Ĉina Montgrimpa Ekspedicio mirigis la mondon per sia sukceso suriri la Montpinton Ĝomo-langma de sur ĝia norda flanko; sed eble pli mirinda estas la kolektivisma spirito de la Ekspedicio, dank' al kiu la rimarkinda sukceso estis atingita.

En iu libro pri montgrimpado eldonita en eksterlando troviĝas la diro proksimume jena de Eric Shipton, angla "esploristo", kiu dufoje provis surgrimpis la montpinton Ĝomo-langma:

Nur sanktulo ne havus tian deziron, ke la kungrimpantoj malsaniĝu, por ke li mem sola povu ĝui la gloron de atingo de la montpinto.

Kia tipa egoisma penso, kiu karakterizas la homajn interrilatojn sub la socisistemo de kapitalismo.

Male al tia malnobla penso, la devizo de la ĉinaj grimpantoj, kiam tiuj alfrontas danĝeron kaj malfacilajon, estas: "Lasu la lastan gluton da akvo al la kolektivo, se vundiĝis la dekstra mano, helpu kamaradon per la maldekstra!"

Ĝuste per tia komunisma spirito de sinoferemo kaj altruismo la Ĉina Ekspedicio komponis kortuŝan triumfan kanton de kolektivismo en la tuta lukto por konkero de Ĝomo-langma, lastatempe.

Kvankam nur tri homoj sukcesis atingi la montpinton, tamen ilia sukceso ĝuste dependis de la kolektiva forto. La Ekspedicio konsistis el 214 membroj, ili ĉiuj estas venkintoj en la konkero de Ĝomo-langma, kaj kontribuis sian nemankeblan forton al ĉi tiu brila venko.

Kiam komenciĝis la tria akomodiĝa marŝo en la konkero de Ĝomo-langma, la montgrimpantoj de la Ekspedicio surgrimpis sur neĝokovritan deklivon altan je 7600 metroj super la marnivelo en severa malvarmego de pli ol 30° sub nulo C. Estis la unua fojo ke ili supreniris ĝis tia alteco. La maldenseco de oksigeno kaŭzis kapturniĝon, anhelon kaj gravan korpan malfortiĝon. La Ekspedicia stabo tuj ordonis intermitan uzon

De-maldekstre: Ŝi Ĝanĉun gvidanto de la montgrimpa ekspedicio kaj la tri montgrimpaj herooj Van Fuĝoŭ, Gonpa (tibetano) kaj Kju Jinhua.

de la artefarita oksigeno. Ĉiuj surmetis la tiucelan maskon, malfermis la volvon kaj tuj eksentis malpezecon kun varma fluo tra la tuta korpo. Sed Ŝi Ĝanĉun, la ĉefo de la Ekspedicio, ankoraŭ estis malfacile spireganta kaj sintrenanta. Sur lia vizaĝo ankaŭ estis masko kaj kun malfermita volvo, tamen post longa tempo li ne povis enspiri la oksigenon. Zorgema kontrolo montris ke la enspira aperturo de la masko estis ŝtopita de glacio. En tia malaltega temperaturo estis tre malfacile forigi ĝin. Tiam, Liu Lianman, fajrobrigadano el Harbino senhezite demetis sian maskon kaj surmetis ĝin sur la vizaĝon de Ŝi Ĝanĉun, kiu dankeme skuis la kapon kaj redonis la maskon. Sed Liu insiste rifuzis repreni kaj remetis ĝin sur lin, dirante: "Vi estas ĉefo de la grupo, vi devas komandi la tutan ekspedicion en ĝia agado. Vi devas nepre surmeti la maskon, ne simple por vi mem, sed pligrave, por nia tuta kolektivo." Kun tia komunisma stilo estas niaj montgrimpaj ekspedicianoj prenante la malfacilajojn kaj danĝeron por si mem kaj lasante la sekurecon kaj oportunon al la aliaj.

Foje, la Ekspedicio ekiris de la kampadejo je 7,800 metroj super marnivelo paŝante sur neĝo kaj glacio, laŭ ekstreme kruta montdeklivo, kaj atingis lokon je 8,100 metroj super marnivelo. Tiam estis jam nigre malluma nokto. Sed la transportistoj ne povis sekvi ilin kaŭze de neĝoblovado. La grimpantoj ne havis manĝajon, nek hejtajon en siaj tornistroj. La minaco de baldaŭa turmentado de malvarmego kaj malsato estas antaŭvidebla. Du tibetaj membroj, Lhagpa Cering kaj Migmar, senhezite sin anoncis por samnokte reiri al la kampadejo situanta je alteco de 7,600 metroj super marnivelo por aranĝi la aferon riskonte defalon de krutajoj en la malluma nokto kaj malgraŭ doloroj ĉe la talio kaj dorso por lacega dekkelkhora marŝado. Kiam, poste, la subskribinto demandis ilin, kia forto instigis ilin al tiu brava ago, tiuj du tibetanoj el servutaj familioj ridete respondis per redemando: "Por la feliĉo de ni tibetanoj, multaj hanaj laborantoj kaj anoj de la Popola Liberiga Armeo ŝvitas, verŝas sian sangon kaj eĉ oferas sian vivon, diru, kia forto igas ilin tion fari?"

Supren laŭ la kruta neĝoklifo

La ekspedicianoj ankaŭ neniam forgesos la kontribuon faritan de la meteorologiaj laborantoj al la venko super Ĝomo-langma. Per ŝajne banala laboro de observado ili elkalkulis akurate ke regos plej bona vetero en la regiono de Ĝomo-langma de la 19-a ĝis la 25-a de majo, tiel ke la Ekspedicio povu kapti la plej oportunan tempon por surgrimpi la montpinton ĝustatempe, antaŭ ol la alveno de malfavora vetero.

Foje, kiam la Ekspedicio preparis sin por marŝi de la Kampadejo no 3, alta je 6,400 metroj super marnivelo al loko alta je pli ol 7,000 metroj super marnivelo. La meteorologiaj laborantoj de la ĉefsidejo subite informiĝis, ke furiozos neĝoŝtormo ĉe la zono super 7,000 metroj. Por averti siajn kamaradojn, du laborantoj Vej Guangfu kaj Tan Kejuan, el la ĉefsidejo rapidis kontraŭ vento kaj neĝo al la Kampadejo no 3. Por tien atingi ili devis sin levi en alteco de pli ol 1,300 metroj kaj trapasi abruptajn krutaĵojn kaj danĝerajn glaciejojn. Tiu distanco bezonas laŭ la plano de la Ekspedicio tri tagojn. Sed por sekureco de la kunbatalantoj ili sukcesis atingi la kamaradojn ĉe ilia ripozejo, tiu—noktmeze, post

Jam 8100 metrojn super marnivelo. La "trian poluson" (supre meze en la foto) ili konkeros post momenta ripozo.

Glaci-turoj sur ambaŭ bordoj de la Orienta Rongbuk-glacirivero, 6200 metrojn super marnivelo.

ALVOKO DE V.P.E.A.

Al geesperantistoj-pacamantoj en la mondo*

Karaj geamikoj,

La ĉi-jara 20-a de julio memorigas la vjetnaman popolon samkiel ĉiujn pacamajn popolojn en la mondo pri granda venko de Paco: Antaŭ 6 jaroj, la Ĝenevaj Konvencioj subskribitaj la 20an-7-1954 ĉesigis la agresivan militon en Hindoĉinio sur la bazo de rekono de la suvereneco, sendependeco kaj teritoria integreco de Vjetnamio, Kamboĝo kaj Laoso, kaj stimulis ke ekde la 20a-7-1955 la kompetentaj aŭtoritatoj en Sudo kaj en Nordo de Vjetnamio starigu konsultan konferencon por pridiskuti pri la organizo de libera ĝenerala balotelekto en tutlando je julio de 1956, je celo reunuigi Vjetnamion per pacrimedo.

Movigita de la spirito de paco kaj de nacia reunuigo, sopiroj de la tuta vjetnama popolo, la registaro de Vjetnama Demokratia Respubliko ĝis nun ĉiam serioze aplikis la Ĝenevajn Konvenciojn tiel, kiel rekonis la raportoj de la Internacia Supervida kaj Kontrola Komisiono en Vjetnamio, la registaro de Vjetnama Demokratia Respubliko plurfoje faris proponojn je celo reunuigi Vjetnamion per pacrimedo. Tamen, la registaro de Ngo-dinh-Dziem en Sudvjetnamio, laŭ ordono de usonaj imperiistoj, persiste tion kontraŭstaris kaj igis la ĝeneralan balotelekton ĝis nun nerealigebla.

Dum 6 jaroj, la usonaj imperiistoj tagon post tago intensigis intervenon en Sudvjetnamio, manipulis sian lakeon Ngo-dinh-Dziem ĉiurimede difekti la Ĝenevajn Konvenciojn, transformi Sudvjetnamion en novmodelan kolonion kaj novan militbazon de Usono.

La tuta vjetnama popolo de Sudo ĝis Nordo decideme kondamnas kaj akuzas antaŭ la tutmonda opinio la manovrojn kaj fiagojn de la kliko Usono-Dziem kaj firme nepre postulas:

— ke la milita delegacio MAAG (Milita Konsilanta Helpanta Grupo) estu forpelita for de Sudvjetnamio!

— ke la registaro Ngo-dinh-Dziem tuj forĵetu sian faŝisman leĝon 10/59!

Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio
Hanoi, la 25-an de julio, 1960.

---

* Mallongigite.

persista marŝado dudekkelkhora. Kiam ili komunikis la averton al siaj kunbatalantoj, ili apenaŭ havis forton paroli, sed sur iliaj lipoj pendis triumfa rideto.

Por plejeble redukti la konsumiĝon de energio de la membroj sturmontaj la montpinton, kiel garantio por la venko de la tuta Ekspedicio, la membroj de transporta trupo prenis sur sin la pezan ŝarĝon. Ili tre malofte, aŭ simple ne uzis sian artefaritan oksigenon, eĉ kiam ili ĉiuj kun ŝarĝo de pli ol 30 kilogramoj surdorse marŝas en oksigenmanka loko alta je pli ol 8,000 metroj super marnivelo, por rezervi kiel eble plej multe da artefarita oksigeno al montpinto-sturmontoj.

Kiom tiuj "sennomaj herooj" en la Ekspedicio meritas niajn ĉiamajn prikanton kaj imitadon! Kuracisto Vu Jongŝeng ne estas fizike forta mem, sed por certigi la sanon de la kamaradoj, li sekvis la Ekspedicion ĝis alteco de pli ol 7,000 metroj super marnivelo malgraŭ malbona vetero kaj danĝera topografio. La proviantistoj klopodis ĉie por venigi el diversaj lokoj de la lando grandkvante diversajn necesajojn kaj ekipajojn. Ili plej frue atingis la montregionon kaj estis la lastaj kiuj ĝin forlasis. Radiotelegrafaj laborantoj tage kaj nokte kontaktigis la Ekspedicion kun la koncernataj fakoj en ĉiuj partoj de la patrolando. Kuiristoj ĉiutage faris bongustajn manĝajojn por la montgrimpaj sportistoj.

Jen, tiel batalas la ĉinaj montgrimpantoj por la afero de la kolektivo, kiel unu el la anoj skribis en sia taglibro: "La kolektivo estas mia patrino, kaj mi, ĝia filo, se ne ekzistus la kolektivo, ne ekzistus mi mem. Mi oferos senkondiĉe mian sangon kaj mian vivon al la kolektivo, por ke mia sensignife nemenciinda individuo eligu lumon kaj varmon en la grandioza kolektivo."

ESPERANTO MARŜAS

Nova E-societo en Hindio

La 8-an de marto 1960 estis fondita Esperanto-Societo de Kalkata. La societo kunvenas unufoje ĉiusemajne por daŭrigi studon de la internacia lingvo post mallonga kurso antaŭ nelonge finita. Ĝia prezidanto estas prof. Somnath Maitra. La societo forte deziras kontakti aliajn societojn en Hindio por preparo de la fondo de Esperanto-Asocio de Hindio.

Nova esperanta gramofondisko

Pola Esperanto-Asocio lastatempe eldonis gramofondiskon (longdaŭran), kun 6 kantoj. Mendebla ĉe Pola Esperanto-Asocio kontraŭ zl. 36.

Klubo de la Internacia Amikeco en Rostov, USSR.

Antaŭ nelonge en Rostov fondiĝis Klubo de la Internacia Amikeco. Tiun klubon ofte vizitadas eksterlandaj turistoj por persone konatiĝi kaj amikiĝi kun rostovanoj. Okazas dancoj, komunaj kantoj, ludoj k. s. Rostovaj esperantistoj estas aktivaj membroj de la klubo. Oni esperas, ke ĉiuj eksterlandaj esperantistoj vojaĝantaj en Sovetio vizitos la klubon. Ĝia adreso: USSR. Rostov-Don, ul. Engeljsa No 139. Sad im. 1-go Maja. Klub Internacionaljnoj Drujby.

Viktor Gruŝko

Esperanto-lernado de laboristoj kuraĝigata en Bulgario

La Centra Intersindikata Konsilantaro en Bulgario eldonis instrukcion pri organizo de Esperanto-kursoj en fabrikoj kaj oficejoj. Interalie oni diras, ke la simpla gramatiko de Esperanto donas eblecon al la laboristoj ellerni ĝin en mallonga tempo kaj utiligi ĝin por internaciaj kontaktoj.

Poste oni donas praktikajn kaj detalajn instrukciojn al la fabrikaj kaj oficejaj sindikataj komitatoj pri helpo kaj subteno de la organizotaj Esperanto-kursoj.

Laŭ Bulgara Esperantisto

Dana Antologio en Preparo

Dank' al klopodado de danaj esperantistoj, la Dana Instruministerio asignis al Centra Dana Esperantista Ligo 5,000 kronojn kiel helpon por eldoni danan antologion en Esperanto.

ĈINA ANTOLOGIO

Unu el la Plej Imponaj E-Libroj Eldonitaj en Ĉinio

15.3 × 23 cm., 412 p. en bela bindo kun protekta kovrilo k 14 bildoj, inkluzive 3 kolorajn.



Aperis ankaŭ **Bildkarto Serio II** ***Floroj kaj Birdoj*** konsistanta el 8 plurkoloraj deŝireblaj il. pk. kunigitaj en broŝuro.

Prezoj

Lando	Ĉina Antologio	Floroj k Birodj
Sovetunio	12 rb.	80 kop.
Usono	2 dol.	0.20 dol.
Britio	10 ŝil.	1 ŝil.
Nederlando	7 gld.	0.50 gld.
Francio	8 fr.	0.70 fr.
Germanio-okc.	6 Gm.	0.60 Gm.
Italio	1000 lir.	100 lir.
Belgio	100 b. fr.	8 b. fr.
Japanio	500 yen.	50 yen.
Finnlando	500 f.m.	50 f.m.
Jugoslavio	600 din.	50 din.
Svedlando	10 kr.	0.70 kr.

Por neindikitaj landoj la perantoj kalkulu laŭ la supre donitaj prezoj.

Poŝtmarkoj de la Ĉina Popola Respubliko kaj *Mi volis viziti lernejon* estas ankoraŭ riceveblaj, sed restas ĉe ni nur malmultaj ekzempleroj de la novelaro *Por nova afero, nova maniero.*

SUR NIA LIBRA BRETO

Sude de la 17-a Paralelo, verkita de Quang Loi, kun antaŭparolo de Dro Le Dinh Tham, prezidanto de la Vjetnama Packomitato, tradukita kaj artaranĝita de Nguyen Minh Kinh, eldonita de Fremdlingva Eldonejo, Hanojo, 1960, estas valora, aŭtentika, leginda kaj legenda libro al ĉiuj, kiuj legas ne por sin distri en sia sensenca enuiga vivo, sed por veramo, justamo kaj pacamo. Ĝi rakontas al vi, kiel brave luktas la vjetnama popolo por paco, reunuiĝo, sendependeco kaj demokratio, kontraŭ la subpremado kaj faŝistaj kruelaĵoj de mezepoka diktatoreco de Ngo Dinh Dziem, la fidela servanto de novtipa koloniismo de Usono.

Vjetnamio ja estis unueca lando, kaj devas resti tia. Ankaŭ en la Ĝenevaj Konvencioj (1954) estas difinita, ke du jarojn post la militĉeso, ĝenerala balotado devas okazi por reunuigi la landon. Sed post la subskribo de la Konvencioj, la usona imperiismo, en koluzio kun la Ngo Dinh Dziem-kliko, ĉiam ilin malobservis, sendante militdelegitaron al Sajgono, senĉese kontrabandante militekipaĵojn por la sudvjetnama armeo, kruele murdante eksrezistantojn, malhelpante la laŭkonvencian reunuiĝon de la Sudo kaj la Nordo, intencante engluti la Vjetnaman Demokratian Respublikon por eterne sklavigi la vjetnaman popolon. En tiu ĉi libro ni povas vidi, kio estas la tiel nomata "demokratio kaj libero" fanfaronata de la usona imperiismo. La libro atestas al ni ne refuteble ankaŭ ĝiajn krimojn: malobservo de internaciaj konvencioj, armadekspansio kaj militpreparado, invado kaj fendigo al alia lando, kaj intenco por ĉiam sklavigi alilandan popolon. Legu kaj pripensu, kie estas vero kaj justeco. Kiun kaj kion vi devas subteni, kaj kiun kaj kion vi devas kontraŭbatali.

La traduka lingvo estas flua, bonstila kaj esprimriĉa, kvankam ankoraŭ ne tute senerara. Iuj vortoj estas neĝuste uzataj aŭ ne kompreneblaj. Ekz. "eklernis la alfabetojn" anstataŭ ". . . alfabeton", kiu egalas al literaro (p. 12, L. 9 de sube), "Malversacio", kiu estas nekomprenebla (p. 61, L. 13 de sube), "Nek la homamaso. , nek la amerikaj veturiloj . ., ne sukcesas . . ." en kiu superfluas la vorto "ne" (p. 99, L. 15).

Venlo Fon

Sub la Jugo de Ivan Vazov — 20 × 14.5 cm. 462 p. Tole bindita, papero bona. Eldonita de la Bulgara Esperantista Asocio. Kolektive tradukita de 9 k-doj kaj redaktita de Simeon Simeonov kaj Asen Simeonov.

Dankoj estu esprimitaj al niaj bulgaraj s-anoj, kies senlacaj klopodoj alportis al ni bonegajn esperantajn tradukojn de elstaraj beletraj verkoj de diversaj epokoj en la historio de Bulgario. Ivan Vazov, popola poeto dum la periodo de demokratia revolucio, estas reprezentata per la multeŝatata romano "Sub la Jugo". Tio estas feliĉa elekto. Vidante Bulgarion en 1876 tra la okuloj de flama patrioto kaj majstra poeto, ni ne povas ne pli enamiĝi kun la heroa popolo kaj bela naturo de la lando kaj samtempe des pli malami la reakcian tiranecon de la turka reĝimo. La tuta atmosfero de la romano estas saturita per la heroa batalspirito de la bulgara popolo kontraŭ la krueleco kaj bruteco de la regantaj fremduloj. La verkisto pentris per plumo de poeto vastan panoramon de la vivo de la popolo kun amo de patrioto. Tial ni trovas la romanon "Sub la Jugo" tiel kara al niaj koroj.

La antaŭparolo de Prof. P. Dinekov faras helpdonan analizon de la romano. Ni ĝojas, ke dank' al Esperanto, ni povas same ĝui la ĉarmon de la amata bulgara verkisto kiel niaj bulgaraj fratoj.

Kvankam en la libro troviĝas preseraroj, diskutindaj esprimoj kaj elfalo de certaj klarigaj notoj, tamen ili ne multe ĝenas la legadon. Kaj mi trovas ĝin unu el la plej valoraj E-libroj kaj varme ĝin rekomendas al ĉiuj seriozaj esperantistoj.

Censinio

Korespondi deziras

* **Makejevka Urba Pacdefenda Esperantista Asocio,** 8 linio 8 prospekto 1/19-31, Makejevka, Donbas, USSR., dez. kor kun ĉinaj gek-doj.

* 45-jara instruisto dez. kor. en diversaj lingvoj. **Ludomir Sobanski,** USSR. Ĥmelnicka obl. Dunajevskij r. Minkivci.

* **Jaroslav Kosik,** Dětenice 104, Ĉeĥoslovakio, dez. kor. kun ĉl.

* **Edward Piskorski,** Piekary Sl. ul. Buczka nr 50-szk. nr. 4, Pollando.

* **V. Tetuŝkin,** per. Polzunova 6/10, kv. 24, Ĥarkov-14, USSR., dez. kor. kun ĉl.

(Pliaj sur p. 214)

Sceno el la papertranĉaja filmo "La Simio kaj la Testudo Dividas Arbon", kiu prikantas laboremon kaj primokas malditigentecon.



"La Abelo kaj la Lumbriko" estas pentrita filmo laŭdanta la abelon akirintan belan figuron dank' al sia laboremo, kaj mokanta la lumbrikon, kiu fariĝis tro grasa kaj sentaŭga pro sia maldiligenteco.



Sceno el la pupa filmo "La Incendia Monto", adaptita laŭ la fama romano "Pilgrimo Okcidenten".